



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

Rusky, anglicky nebo esperantsky?

„O mezinárodní jazyk. Středověk byl v jednom ohledu přece jen ideální dobou: Vzdělaný člověk znal latinu, všude se domluvil a vše si mohl přeložit, protože sami autoři nepsali ve své mateřštině, ale latinsky. Rozvojem národního vědomí a kultury vznikl Babylon, z něhož se hledaly různé cesty. Latina již nepostačovala a žádný z velikých národů nechtěl ustoupit druhému, a tak se hledalo východisko ve vytvoření umělé řeči. Potíž je však v tom, že dnes jsou již dosti rozšířeny hned tři mezinárodní umělé jazyky. Esperantisté k nám hovoří z radia a obhájci Occidentalu v ĈSR obnovují svou činnost a žádají redakce o příspěví. I když této španělské podobné řeči rádi přiznáváme maximální logickou stavbu a pojmovou bohatost, máme zato, že již dnes, a tím spíše v budoucnosti, se rusky a anglicky mluvící člověk dohovívá po celém světě — a navíc bude mít přístup ke krásné a vědecké literatuře obou národů v originálech. Co tomu říkáte vy?“ (Z. D. v „Mladé frontě“ 13. 3. 1947 v rubrice: Vy si to myslíte...)

„Ptáte se, co tomu říkáme my? Tož tedy co nejstručněji:

I. Učte se rusky a anglicky! Je to pro každého velmi užitečné a pro mnohého velmi potřebné. Ale učte se taky esperantsky, neboť nesmíte přehlížeti tyto skutečnosti:

1. Každý člověk nemá vlohy, aby se naučil dvěma cizím, velmi obtížným jazykům, a skutečně je málo lidí, kteří se jim dokonale naučili po velké námaze. Zato opravdu každý může se naučit esperantu, a to poměrně velmi snadno.

2. Ani ti, kteří umív rusky a anglicky, nerozumív se všude. V každém mezinárodním shromáždění, na všech těch přechetných kongresech a konferencích je vždy v ě t š i n a účastníků, kteří řečem v těchto jazycích nerozumív a nedovedou na ně odpovívati. Na mezinárodních sjezdech esperantistů si rozumív všichni, každý rozumí každému a každý dovede odpovívati každému.

3. Lidí, mluvív rusky a anglicky, nenajdeme všude nebo je najdeme velmi obtížně a nakonec je nám to málo platné, protože ne každý jest ochoten nám posloužit. Naproti tomu všude snadno najdeme esperantisty, ochotné pomoci nám v naší záležitosti, aspoň za dnešní pospolitosti esperantistů.

4. Mluvívce s cizincem v jeho mateřštině, kterou on dokonale ovládá a kterou my nemůžeme

úplně ovládati, jsme v nevýhodném postavení člověka méně schopného (vzpomeňme si, jak vypadal český inteligent, koktající němčinu, před úplně nevzdělaným hulvátém německým!). — Esperantisté naproti tomu jsou si úplně rovni, protože rozmlouvající mohou ovládati jazyk stejně a ten jazyk je jim stejně cizí a stejně vlastní.

5. Příslušníci jiných velikých národů — Francouzi, Italové, Španělé a pod. — nebudou valně ochotni dorozumívati se s vámi rusky nebo anglicky; naopak budou vyžadovati, abyste s nimi mluvili v jejich mateřštině. Ostatně poslouchati na příklad, jak se Ital a Španěl dorozumívají rusky nebo anglicky, bylo by pro každého Rusa neb Angličana málo povznášející. Naopak dorozumívati se neutrálním esperantem nedotýká se národní citlivosti a řevnivosti příslušníků ani velikých ani malých národů.

II. I kdyby opravdu byly rozšířeny tři mezinárodní jazyky, nemohlo by to nikomu vaditi, aby v mezinárodních stycích užival některého z nich, vždy by tím jen získal. Ve skutečnosti však jest opravdu rozšířen jen jediný: esperanto. O rozšíření occidentalu nedá se téměř mluvíti a o rozšíření nějakého třetího nedá se vůbec mluvíti — není o tom nic známo.

III. Ruština a angličtina otvírá nám cestu ke dvěma velikým národům a literaturám a proto stojí zato učiti se těmto řečem. Esperanto nám otvírá cestu ke všem národům, velkým i malým. A s těmi malými nás spojují také společné zájmy, proto stojí zato učiti se esperantu. Přitom je velmi důležité, že ta cesta má opravdovou cenu jenom tehdy, když ji skutečně užíváme: co je to platno, že u nás statisíce realistů mělo a má maturitu z francouzštiny, když málokterý z nich si přečte francouzský časopis nebo knihu, napíše francouzský dopis nebo promluví s nějakým Francouzem? (Zajímavé thema pro anketu a pro schůzky abiturientů reálků.)

IV. Závěr: „Ať se učí rusky a anglicky každý, kdo k tomu má vlohy a může a chce svých znalostí užívat. Ale každý ať se naučí esperantu, zejména ti, kteří nemají schopnost a potřebu učiti se obtížným jazykům! Neboť: esperanto otvírá každému cestu do celého světa, ke všem národům a literaturám.“ (H. K. B. v odpovědi

redakci „Mladé fronty“, která odpověď zkrátila — budiž uznáno, že dosti výrazně — na 13 řádeček 27. III. 47.)

*

Mladí lidé, zvláště studenti a redakce „Mladé fronty“, měli by věnovati esperantu zvláštní pozornost. Jím především mělo by býti jasno, jakou překážkou pro nutné mezinárodní styky je mnohojazyčnost, jakou brzdou pokroku je nutnost věnovati čas, energii a peníze na učení se mnoha jazykům místo na vzdělávání věcné, odborné a vzdělávání v jazyce mateřském. Jistě neupadl u nich v zapomenutí jinak zdařilý „Congress 1945“.

Mládenci, ruku na srdce! Jak vám bylo, když jste musili v sezeních vyslechnouti jednu věc ve třech, resp. čtyřech jazycích? Jaký to byl požitek pro ty, kteří všem těm jazykům rozuměli, a hlavně pro ty, kteří nerozuměli žádnému z nich (a těch bylo přece — přiznejte si! — nejvíce)? Nebylo vám hloupé, když ani u stolu hodovního, na procházce, na výletech a zájezdech nemohli jste si volně popovídati s cizím kolegou nebo kolegyní, kteří se vám líbili, na které jste brali nebo kteří brali na vás, když jste neměli jiného dorozumivacího prostředku nežli své ruce a nohy a nanejvýše pochybnou výpomoc koktajlicího tlumočnicka? Zapomněli jste, jak to bylo krásné a milé?

Uvažujte vážně, co námahy, času a peněz by ušetřilo jenom pořadatelstvo, kdyby mohlo psáti do všech zemí, vydávati všechny tiskopisy (programy, protokoly, časopis a pod.) jediným jazy-

kem, esperantem! Oč větší prospěch a potěšení byl by měl ze sjezdu každý z vás, kdyby si byl mohl s těmi Čiňankami, Indkami a pod. pohovořiti aspoň v zákulisí, v kuloárech, když ne ve všeobecných sezeních?

Je samozřejmé, že se esperanto nemůže ihned úplně státi výhradní řečí mezinárodních sjezdů a konferencí, protože staří předáci, vynikající nad druhé znalostí jazyků (a třeba ničím jiným) nevzdají se užívání svých namáhavě získaných znalostí jazykových, i kdyby se odhodlali připojiti k nim ještě znalost esperanta (což by pro ně bylo obzvláště snadné). Co však lze odstraniti ihned úplně, jsou ty dorozumivací nesnáze v osobním styku společenském, u stolu, na vycházkách, výletech a pod., a to znamená nesmírně mnoho, jak přízná každý, kdo třebaš jen jednou byl účastníkem takového podniku.

Užívání esperanta ve všeobecných sezeních pronikne pak samo sebou postupně tak, že se stane naprosto všeobecné a výlučné, že úplně nahradí užívání národních jazyků v mezinárodních podnikcích všeho druhu k nesmírnému prospěchu všech. Pak budou moci mluvit i ti, kteří dnes musí mlčeti, ač by měli co věcného říci svým druhům, kteří jejich jazyku nerozumějí. Pak budeme ve šťastné situaci starých Řeků, kteří proto byli moudřejší jiných národů, protože neztráceli čas učením se mnoha jazykům a ušetřený čas věnovali učení věcnému a vzdělávání jazyka mateřského.

Pro to vše měli by míti smysl obzvláště mladí lidé, především studenti a i — redakce „Mladé fronty“.

Bšk.

Verda Borás

Svedio estas lando riĉa je arbaroj. Multaj vilaĝoj kaj urboj situas inter la arbaroj. Ankaŭ la urbo Borás. Ĝia ĉirkaŭaĵo estas ĉarme verda kaj belegaj parkoj en ĝi la urbon ankoraŭ pliverdiĝas. Sed ankoraŭ io. En Borás estas multe da esperantistoj, vere bonkoraj samideanoj. Kaj simbola koloro de Esperanto tamen estas la koloro verda, do mi volus diri, ke Borás estas la plej verda urbo en tuta Svedio — se ne en la tuta mondo.

Malsanulejo estis provizore sed zorge preparita en knabina lernejo, por resanigi malfeliĉulojn el germanaj koncentrejoj. La pacientoj, kiuj povis jam promeni en ĝardeno, staris tutan tagon ĉe la ĝardenbarilo, serĉante trovi metodojn por interkompreniĝi kun svedoj, kiuj staris sur la strato kaj scivoleme rigardis la fremdulojn. Ni ĉiuj estis miksaĵo de diversaj nacioj, ĉeĥoj, poloj, rusoj, francoj, jugoslavoj, hungaroj kaj grekoj. Nek unu el ni konis svedan lingvon, do paroli kun svedoj estis treege malfacila tasko. Multaj el ni intencis lerni svedan lingvon, sed tio postulas sian tempon kaj ni volis interkompreniĝi tuj. Ni parolis pli multe permane ol perbuŝe kaj da komikaĵo estis ĉiam sufiĉe. Pleje ridis ĉiuj, kiam niaj knaboj intencis ĉiueble esprimi amon al belaj svedaj blondulinoj.

Foje vizitis la polojn en lazareto iu polo, kiu

vivis jam kelkajn jarojn en Svedio. Li estis kara gasto por poloj kaj por mi ekkomenco de mia feliĉo. Li estis esperantisto. Kiam mi ekvidis la verdan stelon, mi treege ekĝojis. Post kvin jaroj mi renkontis esperantiston, mi povis esperante paroli. Mi demandis lin, ĉu en Borás estas esperantistoj. „Ho multe,“ li diris, „vi baldaŭ konvinkiĝos pri tio. Mi informos ĉiujn pri vi.“ Kaj vere. Duan tagon vespere venis al la barilo du svedoj kaj demandis, ĉu estas ĉi tie la ĉeĥo, kiu parolas esperante. „Jes,“ mi respondis kaj ni jam interparolis. Kvankam mi ne parolis flue kaj perfekte, ĉar dum mia kvinjara arestado en Germanio mi ne havis okazon uzi Esperanton, tamen ni bone interkompreniĝis. Kaj nun la atencito de ĉiuj apartenis nur al ni. Multaj ne konis, kian lingvon ni parolas. De tiu ĉi momento mi jam ne estis fremdulo, mi havis jam amikojn, Bror Andersson kaj Elis Johansson, ambaŭ laboristoj, metal-rabotistoj. Ne nur ili, sed ĉiuj preterstarantoj estis tre scivolemaj. Mi diris al ili, kiel oni turmentis nin en Germanio, ke mi estis arestita kiel ano de kontraŭnazista organizacio, ke mi havas du infanojn, kiujn mi jam kvin jarojn ne vidis, ke mia edzino ok monatojn havas nenian sciigon de mi ktp. Malfrue vespere ni adiaŭis kaj tiun nokton pro ĝojo mi povis nek dormi. La vizitoj ĉe la barilo ripetigis preskaŭ

ĉiutage. Ili invitis min en sian hejmon. Kvankam mi jam sufiĉe resaniĝis kaj mia pezo plialtiĝis de 40 kg al 50 kg, tamen mi ne estis ankoraŭ tute sana kaj la kuracisto ne donis al mi elirkarton.

Tiujn du amikojn baldaŭ sekvis aliaj esperantistoj, kun kiuj mi bonege amikiĝis, dro Szilagyi kaj lia edzino, ankaŭ esperantistino, (hungaroj, kiuj vivas en Svedio), E. Lindberg, Henry Iverj , Algot Johansson, Bengt Markling, s-ino L. Paulsen, Greta Bergstr m kaj aliaj. Iun tagon aperis en la gazeto „V stg ta Demokraten“ la artikolo kun titolo: „La Bor sa metal-rabotisto interparolas esperante kun ĉeĥa ŝuisto“. La bildo, mi kun B. Andersson starante ĉe barilo, ilustris la raporton. Post aperigo de la artikolo la rondo de miaj amikoj ankoraŭ pligrandiĝis. La esperanto-literaturon, la bonbonojn, fruktojn, vestaĵojn kaj multajn aliajn donacojn ankaŭ por miaj infanoj mi ricevis.

Baldaŭ mi resaniĝis tiom, ke mi ricevis la elirkarton kaj mi povis viziti miajn amikojn. Ili ĉiam gastigis min bonege. La manĝaĵon oni preparis bonguste, la lakto kaj fromaĝo mankis preskaŭ neniam sur la tablo. Manĝi viandon kaj trinki lakton en Svedio oni povas ofte vidi. Ankaŭ sukeron oni multe uzas. Do mi havis

okazon viziti svedajn samideanojn en iliaj hejmoj, en iliaj familiaj rondoj. Kaj mi povas diri, ke svedoj vivas bone. La naturo de sveda popolo estas ankaŭ bona. Ili estas ĝentilaj, bonkoraj kaj konfidemaj. Kaj ankoraŭ unu bonegan econ ili havas. En Svedio oni ne ŝtelas. Ses monatojn mi vivis en Svedio. La tutan tempon mi restis senĉese en plej bona kaj sincera kora amikeco kun svedaj bor saj samideanoj. Pro tio mi estas dankema el Esperanto. Kaj nun mi kaj ĉiuj, kiuj praktike uzis Esperanton en fremdlando, povas diri, kiom valora instrumento ĝi estas. Kiom da amikeco Esperanto jam kreis. Ne, Esperanto ne estas „kungluajo“. Tion diras nur tiu, kiu Esperanton ne konas, kaj ĝin praktike ne uzis.

Mia amikeco kun svedoj daŭras eĉ nun. Ni interkorespondas, kaj ankaŭ pakajojn ili de tempo al tempo sendas al mi.

Mi memoras ofte belegan verdan Bor s, mi memoras ankaŭ urbojn Lund,  lmhult kaj tutan belan Svedion, kie plaĉis al mi ĉio treege. Sed tamen ne ĉio. La bakita sango kun sukero, grandaj maraj kuiritaj fiŝoj, kaĉo, varmigigitaj mirteloj surversigitaj per malvarma lakto.

Jos. Buben.

Novaj libroj

Sub tiu ĉi titolo mi publikigadis en nia estinta revuo LIGILO suplementojn por legantoj kaj uzantoj de mia ĉeĥlingva libreto »R dce ĉesk ho esperantisty« (1929). La lasta (VII-a) aperis la 20-an de februaro 1939. En marto de la sama jaro, por ni tiom fatala, eldonis BES en Potŝtejn mian verketon »Zajim te se o esperanto? (Ĉu vi interesiĝas pri Esperanto?), kiu en simila maniero, sed multe pli profunde, pritraktis en 150 demandoj kaj respondoj la materialon uzeblan por niaj propagandistoj. Bedaŭrinde — la libreto ne povis esti sufiĉe disvastigata pro la politika situacio.

Jen kelkaj aldonoj al ĝi, novaj por ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj, subpremitaj kaj izolitaj preskaŭ sep jarojn. La nomaro ne povas esti kaj certe ne estas kompleta kaj mi danke akceptos ĉiun ajn atentigon pri ĝia manko.

Nacilingvaj tradukoj.

El la angla: Dickens Ch.: La batalo de l'vivo (trad. D-ro L. L. Zamenhof), 128 paĝoj, nova eldono; Gold Michael: Judoj sen mono (Georgo Saville); Hamblin H. Thomas: La preĝo de nia sinjoro (Frederic W. Hipsley); Shakespeare W.: Romeo kaj Julieto (Stephen A. Andrew); Williams J. E. Hodder: Skizo de la vivo de fama asociano George Williams; el la bulgara: Jorda Jovkov: Patro kaj filo (Hristo Iskrov); Karalijŝev Angel: La Ponto (N. Vasilov); Nikolaj Rajnov: Batalo (At. Nikolov); Ivan Vazov: Avo Joco rigardas (K. R. Georgiev); el la ĉina: Diversaj aŭtoroj: Nova tasko (Cicio Mar); 80 p.; Sung Chiti & Cing Julin: Nova vivo (Venlo Fon); el la dana: A. P. Andersen: Pri bredado de abeloj (H. N.

Nederland), 102 p.; H. Ch. Andersen: La malbona suvereno (H. P. Frodelund), St. Blicher: La pastro en Vejlbje (A. H. Petersen), A. B gh-Hogsted: Pli ol fantazio (C. Graversen), 71 p.; H. Kirk: Taglaboristoj (L. Friis kaj W. Jensen), 218 p., Martinus: Pasko (Th. Hammarlund), 74 p.; el la flandra: Frans Daels: Landdefendado per nemilitaj periloj (J. Debeuf kaj Uittenbogaard), 40 p., Guido Gezelle: Se aŭskultas la animo (Hector Vermuyten), 48 p., Maurits Sabbe: Virina koro (D. Mortelmans); el la franca: G. Duhamel: Norda kanto (Roland Dupuis), 50 p., la sama: Rakontoj pri Nederlando (Roland Dupuis), 57 p., Allan Kardec: Enkonduko en la studadon de la spiritisma doktrino (L. C. Porto Carreiro Neto), 39 p., la sama: La libro de la Spiritoj (L. C. Porto Carreiro Neto), 531 p., la sama: Preĝlibro por spiritistoj (I. G. Braga), 80 p., M rim e P.: Colomba (J. Bean), 148 p.; el la germana: Fratoj Grimm: Neĝulino kaj aliaj fabeloj (Kabe), 94 p., nova eldono, Andreas Latzke: Homoj en milito (Ch. Minor), Hans Thirring: La mondopaco kiel psikologia problemo (Hugo Sirk), 36 p.; el la hebrea: L. Malah: Misisipi (I. Jurysta), 64. p., J. L. Percec kaj S. G. Frug: Hebreaj rakontoj; el la hinda: J. Kriŝnamurti: Sperto kaj konduto (Petro Stojan), 22 p., el la hungara: D-ro Kun Andor: Kion oni devas scii pri la Hungaroj (Emeriko K. Kovarcz), 34 p., K. Aszl nyi, Ses vangofrapoj (L. Spierer), 148 p., Andras Fay: Elektitaj fabeloj (Maŭro); el la itala: J. Giacosa: Ŝakludado (J. kaj R. Padulli), 47p., J. Silone: Fontamara (A. Anĝelo kaj J. Van Scheepen), 188 p.; el la japana: Iŝikaŭa Tacuzo: Vivantaj soldatoj (Verda Majo),

144 p.; el la kroata: Miroslav Krleža: Adriatika temo (Marko Demetrovič), 22 p.; el la nederlanda: H. Boschma: Kristo kaj Hitlero (M. F. Roelants), 16 p., A. M. de Jong: La perfido (W. F. Kruit), 245 p., Jef Last: La Hispana tragedio (G. J. Degenkamp), M. H. Székely-Lulofs: Kulio (P. J. Makkinje); el la norvega: Bj. Björnson: Synnove Solbaken (Edith kaj August Weide), 96 p.; el la pola: H. Sienkiewicz: La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj (Kabe), nova eldono; el la portugala: J. de Alencar: La vidvineto (L. C. Porto Carreiro Neto), 87 p., A. Brigol: Santos Dumont, la aerpioniro (Maria de Amaral Malheiro), Agostinho da Silva: La araneoj (M. S.), la sama: Lasta vojaĝo de Scott (M. F.), la sama: La vivo de Eskimoj (L. M. F.), la sama: Piccard en la stratosfero (J. B. A.), la sama: Vivo kaj morto de Sokrato; en la portugala kaj Esperanto: La Evangelio laŭ Sankta Johano kaj la Prediko sur la Monto, 104 p.; el la rusa: Vladimir Korolenko: La senlingvulo (M. Sidlovskaja), nova eldono; el la sanskrita: Bhagavad-Gitā: Sublima kanto pri la senmorteco (F. Vlad. Lorenz), 96 p.; el la sveda: Folke Bernadotte: La fino (St. Engholm), 139 p., David Flood: Mi serĉis oron kaj oleon, sed trovis.... (K. Gustafsson), 132 p., Z. Hasse: Humora novelaro (F. Szilagyí), 60 p., David Hedergard: Vorto viva (E. Carlen), 30 p.

Originalaj verkoj:

Adi: La forto de l'vero (64 p.), Albumo de Bulgaraj esperantistoj (146 p.), Adresaro de Aŭstralia Esperanto - Asocio, K. Bartelmes: Vartejoj (romano, 128 p.), I. E. Brage: Monumento de Carlo Bourlet (112 p.), la sama: Esperantismo (32 p.), C. J. Caldera: Historio de la Esperanta movado en Okcidenta Aŭstralio, 1911—1945, D-ro Csaba Csapody de Fejerygyhaza: Sankta Stefano, la unua apostola reĝo de la Hungaroj, Colin Evans: Islamo esperantiste rigardata, St. Engholm: Infanoj en Torento (144 p., volumo II-a), E. Deligny: Katalogo de la Esperantistaj libroj (48 p.), la sama: Mia esperantista vivo, 1900—1943, E. D. Durrant: Aeronautika Terminaro (36 p.), H. L. Egerrup: D-ro Dorner (208 p.), St. Engholm: Maljunulo migras, I. Geogiev kaj T. Isev: Rido sanigas (kolektitaj anekdotoj, 111 p.), Alf Hasle: La Esperantista studrondo, Chr. Hougaard: Okazas nenio (63 p.), J. Kohen-Cedek: Tiberio (poemo, 65 p.), Laborista Klubo, Kopenhago: Tra densa mallumo, Literatura Observo: Estonio, Latvio, Litovio, 1939, F. Vlad. Lorenz: Al la deka Brazila Kongreso de Esperanto, Lu-Sin: Elektitaj noveloj (140 p.), Donald W. Munns: Londonanidoj (98 p.), Nia helplaboro en Hispanuja Savado de la infanoj, Im. Olšvanger: Eterna sopiro, Plena malkaŝo de Japana ambicio, F. A. Postnikov: Kiu estas kiu? (USA), Tibor Sekelj: La trovita feliĉo, E. Alleyne Sinnotte: Lilio (190 p.), Jan Stronne: 50 jarojn kun Paul Nylén, Mason Stuttard: La virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj (150 p.), Fr. Szilagyí: La granda aven-

turo (144 p.), J. Tanuma-Tosio: La originoj de l' Protestantismo, D-ro J. O. Thomson: Kantono sub bombardoj de japanaj aviadiloj, Terminaro por Infanludoj (Komitato de Societo de Britaj esperantistoj), Tipoj kaj aspektoj de Brazilo, Urbo Salvador (Eld. Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko), D-ro Vallienne: Cu li? (195 p., nova eldono), Voĉoj de Poetoj el la Spirita mondo (Brazilo), Edith Wynner: Pac-planoj laŭ la karto (USA).

Diverslingvaj tradukoj:

Giedra B.: Violetoj (50 poemoj, originalaj aŭ tradukitaj), F. Vlad. Lorenz: Diverskolora bukedo (Poemoj, tradukitaj el 40 lingvoj, 159 p.), Pensoj de Zamenhof (tradukoj el Esperanto — france, angle, germane, itale — Svisa Esperanto Societo).

Lerniloj (lernolibroj, vortaroj):

Nikolov Atanas: Plena Esperanto - Bulgara vortaro (488 p.), la sama: Esperanto - bulgara frazaro (48 p.), Bruin G. P. de: Facile lerni Esperanton (56 p.), Edward G. Lock kaj Mason Stuttard: Nelson's Esperanto Course (228 p.), Richard Levin: Nouveau Cours d'Espéranto (176 p.), M. Minnaert, G. F. W. Mulders kaj J. Houtgast: Fotometria atlaso de la suna spektro (W. P. Roelofs), 347 p., Petro, kursa lernolibro por laboristoj (7-a eldono), W. P. Roelofs: Vortaro pri Lumigoscienco (154 p., nederlande, angle, france, germane, esperante), P. E. Schwerin: Gaja leganto (56 p.), A. Waite: Mia unua Esperanto-libro, la sama: Mia dua Esperanto-libro.

Kantoj (kantaroj):

Centra Dana Esperantista Ligo: Kantante antaŭen! (148 p.), H. Jak: Ĉina kantaro, A. E. Beatty: Espero Internacia (240 himnoj, 232 p.), J. Kohen-Cedek: Hebrea kantaro, La Najtingalo, esperantista kantaro (Eindhoven, Nederlando), Y. Nummi, G. J. Ramstedt, Aini kaj V. Setälä: Sonu, kanto, sonu! 52 p.), Norvega Esperantista Ligo: Komunaj kantoj (24 p.).

Verkoj de ĉeĥaj esperantistoj:

1. Adresaroj kaj propagandiloj:

Berger: BES-Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj, 1939—1940 (14-a eldono, 64 p.), F. Buhr: Tutmonda Interŝanĝa Adresaro, n-ro 4/1946 (4 p.), J. Šupichová: Zajímáte se o esperanto? (1939), Petr Zévl: ABC — Světový adresář — Tutmonda Adresaro (26 p.).

2. Lernolibroj:

Th. Kilián: Esperanto, učebnice a čítanka, IV-a eldono (1946).

Verkoj de slovakaj esperantistoj:

Arnošt Váňa: Medzinárodný jazyk Esperanto (128 p.). Lernolibro (1946).

24. XII. 1946.

Julie Šupichová.

LINGVO

Překlad úkolu 8.

Ne pasis longa tempo de kiam¹ multaj rigardis la teknikon² tre malafable.³ Estis⁴ tiam grava⁵ ekonomia krizo. Estis milionoj kaj dekmilionoj⁶ da senlaboruloj.⁷ Oni parolis pri troproduktado.⁸ La magazenoj estis plenaj kaj la homoj ne povis aĉeti, ĉar ili ne havis monon. Kaj monon ili ne havis, ĉar ili ne povis labori, ĉar nenio estis vendata,⁹ ĉar la ceteraj ne povis aĉeti ne havante monon. Erara cirklo.¹⁰ Kaj multaj kulpigis la teknikon. Ĝi faras ja maŝinojn, kiuj antaŭstas¹¹ multon da homoj. Ĝi faras, oni diris,¹² tro da ĉio.¹³ Oni rigardis granda sukceso,¹⁴ kiam ie ĉe konstruado de ŝoseo oni forigis grandan maŝinon¹⁵ fosantan la teron po plenaj veturiloj¹⁶ kaj kiam anstataŭ la maŝino homoj penegis¹⁷ per pioĉo¹⁸ kaj ŝovelilo.

Ni laŭdas junan homon, kiu renkontis maljunulinon¹⁹ kun peza dorskorbo kaj portis ŝian dorskorbon sur iom da vojo.²⁰ Certe li estis bona viro. Kaj ĉu ni malbenu²¹ la teknikon, kiu povas helpi al milionoj kaj milionoj da homoj per tio, ke ĝi deprenas de ili la ŝarĝon de korpa, materia klopodo?²² La homa mizero en la pasintaj epokoj²³ kreskis el la homa soci-orĉo.²⁴ Sed ĝi havis ankaŭ²⁵ kaŭzojn, kiujn oni povas nomi teknikaj. La fabrikado de iuj objektoj, hodiaŭ tute ordinaraj kaj memkompreneblaj, estis tiom nevasta, malrapida kaj neperfekta, ke ĝi sufiĉis nur por malmulte da individuoj. Hodiaŭ la tekniko povas fabriki multe da aferoj por ĉiuj. Sed, kompreneble, tio antaŭsupozas celhavan organizon de la tuta teknika laboro kaj novan organizon de la socio.

Poznamky.

¹ ankoraŭ antaŭ nelonga tempo multaj...; ² juĝis pri la tekniko; ³ malfavore; ⁴ reĝis; ⁵ peza, granda; ⁶ miliondekoj da...; ⁷ milionoj kaj... estis sen laboro; estis senlaboraj; sen okupo; ⁸ superproduktado; ⁹ nenio vendiĝis; nenion oni vendis; ¹⁰ erariga cirklo; magia rondo; ¹¹ anstataŭi = esti en la loko de; esti uzata anstataŭ; plenumi ies rolon aŭ taskon. Anstataŭigi = meti en la lokon de; doni al iu la rolon de; anstataŭigi dornobarilon per muro, oficiston per oficistino; ¹² Lepsi neĝ laŭdire; ¹³ ĝi fabrikas superbezone; ¹⁴ oni opiniis granda sukceso, ke estas granda sukceso; ¹⁵ oni ĉesis uzadi, oni haltigis maŝinon; ¹⁶ ĉaretoj; ¹⁷ pene laboris; ¹⁸ pikfosilo; ¹⁹ maljuna virino; ne: avino, avineto; ²⁰ sur parto da vojo; ²¹ ĉu ni damnu...; ²² ke ĝi liberigas ilin de la ŝarĝo de fizika, materia fortostreĉo, klopodo; ke ĝi forprenas de ili...; ²³ dle smyslu spíše: v minulých věcích, dobách, tedy: epokoj, tempoj; ²⁴ el la homa aranĝo (de socio); ²⁵ „i“ je zde „také“, nikoli „dokonce také“, tedy „ankaŭ“, nikoli „eĉ“.

Karolo Piĉ:

*Urbo en nokto;
la lum' ne lumas;
kamenaj tuboj
fajreras, fumas;*

*Kaj hundoj, kiuj
en ombro bojas,
min ne ekscitas;
jen mi ja ĝojas;*

*nigregoj kuŝas
sur doma aro,
nigregoj, nokto
kaj januaro.*

*ĉar ie tie
en nokt' kaj tempo
atente staras
jam la printempo.*

*Nur ĝojaj lampoj
ne ĉesas brili:
la lampoj, steloj,
lanternoj, ili.*

Překlad úkolu 8.

Tentokráté účast byla potěšitelně větší. Překlad zaslali: Čížek Jar., Praha; Geryk Jan, Brno; Grich E., Poproč; Jandík Rudolf, Černilov; Jelínková Štěpánka, Praha; Ing. Kochman Jos., Praha; Kuba Fr., Olomouc; Ligočká Marie, Brno; Macek Pulgáry; Mihulka Frant., Skuhrov n. Běl.; D. Mrázek, Zlín, Němec Miloslav, Brno; Otčenášek Jiří, Hradec Králové; Procházková Julia, Rajhrad; Proskovec Láďa, Plzeň; Růžička Frant., Holešov; Přehnilová, Olomouc; Vavrušová Anežka, Praha a Zdvihal Jan, Týnec nad Sázavou, celkem 19 prací.

Úkol 9.

Snažíme se předkládati k překladu texty, jež jsou významné i svým obsahem předpokládajíc, že práci překladatelské dodá obsah textu půvabu i posvěcení, dávaje sám v sobě látku k přemýšlení. Tento text je z řeči ministra Jar. Stránského při slavnosti míru Červeného kříže na Bílou sobotu. Raďte nám přeložený text zaslati do 25. května.

Touha po míru.

Touha po míru a obava o mír plní dnes všechna srdce, trýzněná po léta a vlastně už po desítky let strachem, útliskem a válkou. Kdyby nic jiného, už pouhé vzpomínání na ty černé a nekonečné dny nesvobody mělo by sbratřovat nás všechny, kdo žijeme pod společnou národní střechou a kdo se tisneme u společného národního stolu. Touha po míru je touha po štěstí, ale ne po onom rozmarném štěstí, které potkává, koho chce, a koho chce, miji — je to spíše touha po onom štěstí, jehož je každý z nás strůjcem nebo aspoň spolustrůjcem. Vojna i mír jsou dílo lidí, nejsou to přírodní katastrofy.

Ptejme se jedni druhých vlídně a ptejme se přísně každý sama sebe, tažme se denně a zvláště v tento den, dělá-li každý z nás, co dělat může, aby mezi námi bylo dost účinné lásky, dost důvěry a také dost společné práce. Bez lásky, důvěry a součinnosti bude lidský život stále méně lidský a bude nakonec nelidský. Není pod naší národní střechou a u našeho národního stolu zbytečně mnoho zamračených čel a sevřených pěstí? Buď v Čechách bílý den a plno růží kolem — v tom Nerudově verši není jen obraz míru, je v něm i jeho předpoklad. Udělat ze života jas a květy — nikdo by nestačil sám splnit ten příkaz. Můžeme jej postupně plnit spolu.

Spoluprací se k míru dostaneme jen tehda a jen tehda spoluprací mír zabezpečíme, nespokojíme-li se spoluprací pouze technickou, hospodářskou, politickou a brannou, ale vzchopíme-li se i k spoluprací duchové a mravní, najdeme-li v babylonském zmatení zase aspoň společnou řeč svědomí a rozumu. Dohodnout se, co je dobré a co zlé, co je účelné a co není, je dost neschopné, ale není to nemožné, je-li jen skutečná vůle dohodnout se o tom a zůstat tak v poznané pravdě, padni komu padni. Bez takové vůle je spolupráce jen zdánlivá, bez takové vůle je mír jen předstíraný. Což není právě v tom příčina, proč válka už je skončena a mír se ještě nezačal? A pořád pamatujme, že mír se nezakládá a nezajišťuje jen mírovými smlouvami, pořád pamatujme, že mír je víc než neváleční.

ANTAUSIGNOJ

INFORMOJ

Lingva Komitato Esperantista reviviĝas. Ĝia prezidanto Ir. J. R. G. Isbrücker en Hago dissendis cirkuleron en oktobro al 102 membroj, kiujn enhavis listo de la L. K. en j. 1938. Kiel sciigas cirkulero el januaro 1947 respondis el ili 46, esprimante la deziron denove partopreni en la laboroj. Mortis 23 membroj (Bailey, Belmont, Bobin, Bofil Granada, Boucon, Bulthuis, Cogen, Dreher, s-ino Drezén, Grenkamp, Harvey, Jansson, de Lajarte, Leizerowitz, Lundgren, Minor, Rollet de l'Isle, f-ino Shafer, Stroele. Uiterdijk, Wiesenfeld, f-ino Lidia Zamenhof). Demetis la funkcion 6 membroj parte pro alta aĝo aŭ malbona sanstato, parte pro aliaj okupoj (Archdeacon, Blicher, Kennigott, Kühnl, Šupichová, Waldham). Precipe la ambaŭ ĉefoj ricevu tie ĉi esprimon de nia danko pro laboro, kiun ili dediĉis al taskoj de la L. K.! El la forsenditaj cirkuleroj 10 revenis kun indiko, ke la adresitoj ne estas troveblaj, 15 cirkuleroj ne revenis.

La prezidanto de la komitato proponas, ke la restintaj membroj daŭrigu la laborojn de la komitato. Temas nun precipe pri difino de oficialaj radikoj, kiu laboro estis komencita antaŭ la milito kaj, estante preparita, povas esti daŭrigata.

Krome li proponas renovigi la statuton de L. K. kaj la membraron. Je elekto de novaj membroj devus pli influu naciaj societoj, oni devus atenti, ke estu reprezentitaj ĉiuj nacioj en la komitato kaj ke iu nacio ne havu tro anojn kompare kun la ceteraj. Oni devus ankaŭ nove difini funkcion de la akademio, kiu povus esti sole estraro de la L. K., ne decidanta, sole administranta.

Plano pri kuniĝo de UEA kaj IEL estas jam preta, kiel sciigis numero 6-a de »Esperanto«, datumita la 15-an de decembro 1946, sed veninta nur en aprilo. La kuniĝinta nova centro havos nomon Unueca Esperanto-Organizaĵo (UEO). La nomo ne estas ankoraŭ definitiva, la mallongigaj literoj jes. Al ni la nomo ne

Agado de la Asocia kongreso 1947

en Praha en granda salono de kafejo Louvre, la 30-an de marto 1947 je la 10,15—14,20 horoj.

Ĉeestis entute 96 delegitoj el 36 lokoj. Inter ili Praha 48, Ústí n. L. 5, Olomouc 4, Pardubice 3, Hradec Králové 2, Brno 2, Doksy 2. Plue po unu el Bratislava, Brno, Červ. Kostelec, Česká Lípa, Havlíčkův Brod, Chlumec n. Cidl., Chotěboř, Karlovy Vary, Kladno, Klatovy, Kralupy, Liberec, Louny, Mladá Boleslav, Modřany, Nová Role, Nymburk, Ostrava, Plzeň, Prostějov, Roudnice nad Lab., Sedlec u K. H., Šternberk na Mor., Tábor, Teplice-Šanov, Třebíč, Úpice, Valašské Klobouky, Zeleneč, Zlonec.

La prezidanto malfermis la kongreson kaj salutis la ĉeestantojn akcentante precipe, ke venis preskaŭ ĉiuj regionaj perantoj (17 el 19).

Salutleteroj venis de Centra Estraro de Sindikatoj („Viajn noblajn celadojn por internacia proksimiĝo ni volas ankaŭ estonte subteni kaj ni akcentas, ke niaj Laborlernejoj estis la unua institucio, kiu en la liberigita respubliko kunlaboris kun Vi. Longa vico de Esperanto-kursoj en niaj Laborlernejoj dokumentas pri tio,



Du esperantistoj, veturantaj al Capri dum la Universala kongreso en j. 1935. (El arkivo de s-ano Fr. Buhr.) La unua estas Josef Vavrovský, kiu fervore propagandis esperanton inter policistoj, mortis 20-an de marto 1946. Li estis 67-jara. La dua estas Robert Bloch, tre konata propagandisto, kiu trovis morton kun edzino en koncentrejo en Osviecim.

plaĉas, precipe pro la akcentigo de la unueco en la titolo. La unueco devas ja enesti en la koroj, ne en la titoloj. Tiaj unuecoj tro laŭte proklamataj ofte ne estas tro unuecaj. Sed ni tion ne kredis pri la nova organizaĵo nuna!

La redakcio de la organo »Esperanto« estos en Genevo, kie ĝin honorofice redaktos Hans Jakob, administra gvido estos en Londono, kie estos precipe centro de naciaj societoj propagandaj.

Ni ĝoju, ke la unuigo, pri kiu la esperantistoj emfaze parolis, kiel tre grava kondiĉo de nia progresado, estas efektivigita, kaj ni respondu al tiu fakto pagante kotizon kaj varbante pluajn anojn por estinta IEL aŭ UEA nun UEO. La membro abonanto pagas Kčs 100.—, membro kun jarlibro Kčs 40.—. La kotizojn sendu al la peranto J. Šustr en Praha I, Benediktská 11. Vi povas pagi per Asocia pagilo de poŝta ŝparkaso n-ro 12.371.

ke la laboranta popolo havas intereson pri alproksimiĝo de la nacioj helpe de internacia lingvo. Ni esperas, ke ankaŭ nia plua kunlaborado disvolvigados sukcese kaj ni kalkulas kun iniciatemo de Viaj fakaj laborantoj kaj membroj.“ Subskribita Inĝ. J. Volek, estro de Centra departemento kultura de ŬRO, de J. Šupichová (Praha), Jan Tichoň (Bojkovice), Roman Michna (Lichnov), E. Grupo en Tanvald.

Por Slovaka Esperanto-Societo diris salutante prof. Vlado Jukl el Bratislava: „Salutante tutkore Vian brilan kongreson ankaŭ en nomo de SES, mi kore bedaŭras, ke ne partoprenas rajtigataj slovakaj samideanoj. Ni en Slovakio estas en stato de reorganizo. Mi mem venas el Bratislava, laŭstatuta centro de SES, sed ties organiza, do grava, fako transiris al Trenčín, kie aĝas samideanoj Tvarožek kaj Lamačka. Cefa tasko de SES estas disvastigi Esperanton en Slovakio per ĉiuj rimedoj. Ĝia rilato al tutŝtata organizo estas, kiel Vi scias aŭ facile komprenas, influata de vidpunktoj naciec-

politikaj. La malfacilaĵoj vidiĝas jam el atingita interkonsento en Brno, laŭ kiu SES deziras plej ampleksan memstarecon kaj esti ligata al ia nacia ĉeĥa centro (iu ĈES) per komuna centro tutŝtata.

Mi mem deziras, ke vi ne perdu en nuna situacio tro da valora tempo per diskutado kaj disputado pri tutŝtata organizo. Ĉefa afero restos, ke ni ĉiam plifortigu. Kun ioma envio mi konstatas la imponan progresadon kaj intensecon de nia movado en ĉeĥaj landoj, dank' al via laboremo. Vi ne laciĝu, trovu sekvantojn kaj atingu plenan sukceson!" (Aplaŭdo).

1. Protokolo pri la lasta kongreso ne estis laŭtelegita, ĉar la kunveno konsentis ĉiesvoĉe aprobi ĝin tiel, kiel ĝi estis publikigita en „Esperantista“ ek. j. 1946 sur paĝo 8.

La prezidanto prezentis proponon, ke la kongreso sendu saluttelegramojn:

Al prezidento dr. Edvard Beneš: Al kuraĝa batalanto por interkompreniĝo de la nacioj sendas el sia kongreso saluton esperantistoj de la respubliko.

Al estraro de la registaro: Internacia lingvo Esperanto servas al la respubliko kaj dujara plano fervore, senprofite kaj efike. Kongreso de esperantistoj salutas vin kore.

Al ministro de informoj Václav Kopecký: Esperanto-Asocio en ĈSR helpas informi la tutan mondon pri nia respubliko kaj dujara plano. Esperanto servos ankaŭ plue.

Al ministro de eksterlandaj aferoj Jan Masaryk: Ni salutas prezidanton de Unuiĝo por Unuigita Naciara Organizo.

Al ministerio de eksterlanda komerco: Esperanto-Asocio en ĈSR persekutas ankaŭ praktikajn klopodadojn de Via ministerio kaj helpas per ĉiuj fortoj al sukceso de nia eksporto.

Al ministerio de instruado kaj klerigo: La kongreso de esperantistoj el la tuta respubliko konstatas rapidan kreskon de la movado kaj rekomendas denove al Via atento enkondukon de Esperanto en lernejojn.

Al UNESCO en Parizo: Dankon pro via esploro de internacia lingvo-problemo. Salutas Ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso.

2. La prezidanto en sia enkonduka parolado akcentis, ke la Asocia organo raportis pri farataj kaj faritaj aferoj. Tial li prezentas precipe ĝeneralajn konsiderojn. Ankaŭ nia movado adaptiĝis al la nova ĝenerala linio de la publika vivo en nia lando, al la popola demokratio. Ne sole vastaj rondoj popolaj ekinteresiĝas pri nia movado, sed ankaŭ gvidaj instancoj de la ŝtato. Precipe ministerio por informo kun la ministro sinjoro Václav Kopecký, ministerio por internaj aferoj, de eksterlanda komerco, de fervojoj, de lernejoj. La esperantlingvaj disaŭdiĝoj havas daŭre tre vastan resonon, venis iam el 28 landoj konfirmoj pri aŭskultado. Ankaŭ la sveda vojaĝo de nia membro J. Vitek havis resonon tre respektindan. El korespondajo venanta el fremdlando oni povas citi faktojn, iam surprizajn, pri efikeco de niaj informoj donitaj per Esperanto, kiu pravas, ke la laŭveraj sciigoj kreas amikojn konstantajn. Ekzemple skribis al ni spontanee svedo atentiganta nin pri ĵurnala artikolo sveda kulpiganta nian respublikon pri faŝismo pro forigo de germanoj. Alia ekzemplo estas letero el Buenos Aires, kiu petas klarigojn pri tre detalaj aferoj politikaj kaj ideaj. En tiu sfero ni povas uzi servojn de samideano Dolfa Bartošik, kiu estas oficisto en la Informministerio. Kunlaborado kun Prepara komitato de Sokol-kongreso estas tre promesplena. Niaj membroj petu en la kongresa oficejo kielkajn eldonitajn flusfoliojn kaj aldonu ilin al ĉiu sia letero fremdlanden. Estas preparata eldono de du esperantlingvaj libretoj. La hotelo, kiun al nia asocio proponis urbo Doksvo, ne povis esti de ni akceptita pro troa multkosteco. S-o Špár estis komisiita provi la aferon aranĝi alimaniere.

La ĝenerala sekretario legis detalan raporton. Li transprenis funkcion post ekziĝo de s-o. E. Zavadil la 16-an de majo. La unua tasko, kiun li devis solvi, estis la organizo enlanda. La ideo dividi landon laŭ la regionoj pruviĝis taŭga. Baldaŭ estis starigitaj perantoj en ĉiuj 19 ĉeĥaj regionoj kaj ĉiuj jam aktive funkcias. Multaj

el ili jam trovis por si perantojn distriktajn. Estas espero, ke la vorto „izolulo“ povos malaperi el nia organiza slango. Por organizi laboron de regionaj perantoj ni aperigis 5 cirkulerojn.

Enigi ordon en listojn de aliĝintoj ne estis laboro facila, ĉar la aliĝoj venadis samtempe, ne ĉiam estis plenigitaj aliĝiloj. Fine plenumis tiun taskon labor-brigado de 17 fervoruloj, laborintaj dimanĉon la 5-an de januaro 1947 je la 9—14 horo kaj poste lundon vespere kaj dum la tuta klubo kunveno merkredon. La granda parto de la materialo estis prilaborita kaj la membrokartoj dissenditaj. Tial la laboro en la jaro nuna estos jam pli facila. Venis kelkaj ekziĝoj, motivataj per neebleco pagi kotizon tro altan. Sed la Asocio ne povas ĝin malaltigi, niaj taskoj bezonas monajn eblecojn, ni bezonus ja kotizon pli altan.

Nombro de korespondajoj daŭre kreskas. Mi petis la perantojn, ke ili skribu pri diversaj aferoj sur apartaj folioj, ke mi povu transdoni ilin al kompetentaj kunlaborantoj. Estas granda helpo, kiun donis al mi s-o Slavik, kiu respondis multajn korespondajojn venantajn al lia adreso.

Grava malhelpo en organizaj laboroj estas manko de oficejoj; ĝisnunaj klopodoj trovi ian ajn ejon estis vanaj. Sed ni ne ĉesas tiucelan serĉadon. Eble estas bona antaŭsigno, ke ni sukcesis trovi en Wilson-stacidomo ekspozician ŝrankon.

La rezultoj en diversaj regionoj diferencas. Ĝi estas komprenebla. Kelkaj regionoj havas tre bonan tradicion, la ceteraj malpli. Precipe la regionoj apudlimaj, kien venis nova loĝantaro ĉeĥa, devas krei ĉion de komenco. Tial estas tie akiritaj rezultoj des pli respektindaj.

Novaj lokaj grupoj Asociaj estis starigitaj en Tábor, Karlovy Vary, Liberec. Kiam ministerio de interno postulis de ni pluajn dokumentojn kaj informojn por konfirmi senrompan ekziston de la Asocio, ni prokrastis respondadojn al petoj el diversaj lokoj pri fondo de lokaj grupoj. Fine en oktobro ekzisto de la Asocio estis konfirmita kaj la grupoj povas esti starigataj. Sed ĝis nun okazis tiel nur en Břeclav, el kie mi ricevis informon, ke la grupostatuto estis prezentita al la Distrikta Nacia Komitato.

La interesantoj pri vizito de la Berna kongreso kaŭzis multan korespondadon. Post publikigo de invito en nia organo venis tiom da informpetoj, ke ŝajnis, ke 500 homoj volas viziti la kongreson. Ni faris nian eblon, pri rezultato ni informis en unua numero de E. Ne povos iri pli ol 10 ĉeĥoj kaj tiu nombro de slovakoj, pri kiu interkonsentis SES. Ni plene aprobas vidmanieron de niaj publikaj aŭtoritatoj, kiuj trovas nepre necesa spari, precipe dum la dujara plano, devisojn. Ni ĝoju, ke tio ne daŭros longe.

Vicprez. R. Hromada legis raportojn de la komisionoj: lerneja, virina, akademia klubo, ŝakista, literatura, ekzamena, traduka, skolta, gazeta. Ili resumas gravan laboron. Pri detaloj estis aŭ estos raportite en Kroniko enlanda. Plue li atentigas pri ebleco enmeti en Foiran katalogon ankaŭ ŝlosilon esperantlingvan, kaj starigi liston de komercistoj kapablaj korespondi en Esperanto. Ĝi povus esti iniciato tre utila.

Estro de Libroservo Jar. Šustr raportas pri sia agado, pri multo da mendoj kaj nesufiĉa librostoko pro malfacile riceveblaj deviso. Li rekomendas serĉi novan estron por tiu servo.

Oto Ginz informis, ke estos prezentita al la Landa nacia komitato anonco pri renovigo de nia librovendista koncesio, kies li estos portanto. Per tio ni fariĝos jure rajtigataj komercistoj pri libroj, kaj ni petas afable ĉiujn klubojn kaj unuopulojn, kiuj ie faras tian komercon, kiu estas laŭjure fuŝa kaj nepermesita, ke ili ne plu faru tion. Nia restarigita librovendejo povas denove fariĝi grava faktoro por nia organizo.

Redaktoro de la Asocia organo dro Stan. Kamarýt sciigis, ke li ekziĝis el funkcio de redaktoro, ĉar li rigardas nepre necese, ke la redaktoro estu en Praha. Li redaktos ankoraŭ la venontajn numerojn, por ke ne ekestu tro longa paŭzo en eldonado, sed li nepre postulas, ke estu trovita nova redaktoro.

3. Kasistino Hedvika Nováková legis kasan raporton:

Bilanco Perdo—Gajno

	Aktivoj	Pasivoj
1. Membraj kotizoj		87.857,—
2. Gazeto „Esperantista“	63.851,50	
3. Presaĵoj administraj	2.557,70	
4. Donacoj		1.812,—
5. UEA-procentaĵo (de s-o Slavík)		1.018,20
6. Elspezoj de poŝta ŝparkaso	561,70	
7. Afranko	8.890,80	
8. Vojaĝelspezoj	1.200,—	
9. Diversaj elspezoj	351,40	
	<u>77.413,10</u>	
sen: repaĝo de afranko	72,30	
	<u>77.340,80</u>	
Bilanca gajno	13.346,50	
	<u>90.687,30</u>	<u>90.687,30</u>

4. La revizoroj Frant. Buhr kaj Bedřiška Řeháčková en nomo de la kontrola komisiono deklaris, ke ili esploris la unuopajn dokumentojn laŭ la materialo kaj konvinkigis, ke ili interrespondas kun enskriboj en la kontlibro kaj en aliaj dokumentoj. Ankaŭ la bilancoj ferma kaj perdo-gajno interrespondas en detaloj kaj kiel tuto al la kontlibro. Sekve de tio ili rekomendas al la kongreso aprobon de la finkalkuloj pri la jaro 1946.

Poste estis raportoj pri agado kaj pri la kaso aprobitaj ĉiesvoĉe.

5. Pri ŝanĝo de la statuto. Prezidanto legis tekston, al kiu venis konferenco de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en Brno la 20-an de oktobro 1946. „Estu memstara societo ĉeĥa, kiu organizus esperantistojn ĉeĥajn kaj alilingvajn, vivantajn en ĉeĥaj landoj, kaj memstara societo slovakaj, kiu organizus esperantistojn slovakajn kaj alilingvajn, vivantajn en Slovakio. Ci tiuj du memstaraj organizoj unuiĝas en ĝisnuna reorganizota komuna Asocio, kiu estus supera reprezentanto de la movado en la enlandado kaj eksterlando. Subskriboj: Rosa, Jukl, Malik, Kilián, Geryk, Vondroušek.“ Al sia artikolo en unua n-ro de E. „Ni kreskas“ li ricevis leteron de SES, kiun li ankaŭ

LOKAJ INFORMOJ

Ni rigardas tiun ĉi rubrikon tre grava. Ĉio, kio estas farata por efektiviĝi nian celadon, meritas resti enskribita por venonta historiisto. Tial ni tre petas ĉiujn aktivulojn sciigi nin pri ĉio, kio okazis en ilia loko. Sed samtempe ni petas: Ne volu, ke ni enskribu tie ĉi tion, kion vi intencas. Ni enskribos tion nur, kiam ĝi okazis. Ne volu de ni ankaŭ, ke ni skribu, ke en via loko estas la laboro tre malfacila. Jes, ni scias, ĝi estas malfacila en lokoj ĉiuj.

Bojkovice. — En maska balo de „Sokol“ en Bojkovice aperis 3 maskoj esperantaj. La maskoj estis plaĉaj kaj atentigis je si ĉiujn dancintojn. Tipaj maskoj parolis ankaŭ esperante kaj ĉeestintoj miregis kaj esprimis, ke neniam vidis tiajn maskojn. Kvankam multe da Bojkovicanoj dubis pri ebleco esperantlingve paroli post tiel mallonga tempo de lernado, nune ili konvinkigis, ke tio estas ebla.

Brno. — Ekde la 26-a de marto 1946, do la dato, kiam okazis la unua postmilita ĝenerala kunveno de la E-klubo en Brno, ĝis al ĝia 2-a ĝenerala kunveno, okazinta la 18-an de februaro 1947, montriĝis, ke la kluba historio dum la ĵus pasinta jaro estis riĉigita per kelkaj ĝojindaj faktoj, kiuj sukcesplene evidentiĝadis dum la tuta tempo precipe en la kampo de la disvastigado de nia movado inter nia plej proksima ĉirkaŭo kaj en la urbo Brno mem.

La penado kaj laboro de niaj klubanoj specialiĝadis dum la pasinta jaro ĉefe je propagando de la lingvo kaj movado. Kaj rigardante ĝin tiuvidpunkte, ĝi montriĝas al ni observanto kiel unu el la plej sukcesaj, kiun posedas Esperantista klubo en Brno.

Valora estis kaj multan ambaŭflankan utilon alportis nia kunlaboro kun la Laborlernejo de ŬRO. Sukcese tiel finiĝis la unuaj du kursoj, efektiviĝitaj helpe de nia kunlaboro, kiujn gvidis s-anoj Josef Vondroušek kaj Rudolf Nečas.

Grava estis por nia urba propagando elmontra ekspozicio de esperantlingva literaturo, okazinta la unuan fojon dumsomere kaj la duan fojon dumvintre ĉe la libro-vendejo Komŭrka en la Česká strato. La ekspozicio de bonkvalita

laŭtleĝis al la kunveno. Fakta situacio estas, ke la slovakoj havas memstaran societon kaj apartan gazeton. Neniel volas malhelpi al tiu agado, kaj agadon de nia Asocio ni limigadis al la teritorio ĉeĥa. Tamen ni pensas, ke estus utile, ke ni havu komunan asocion, kiu prezentus nin al fremdlando. Tio ŝajnas esti ankaŭ vidmaniero de pluraj slovakoj. Senco de koncerna artikolo estis ja, ke slovakoj akceptu kunlaboron, pri kiu estis parolite en Brno. Sekvis vigla diskuto, en kiu partoprenis inĝ. Krajic, dr. Pumpr, prof. Jukl, J. Vondroušek, J. Vitek, Dušková, A. Malik. Tiu ĉi precipe akcentis starigon de landaj partantoj, kiuj respondos memstare pri la organizo en koncernaj tri landoj. La rezulton de la diskuto resumis dr. Pumpr atentigante, ke la ŝtata konstitucio estas en preparado, ke tial estos plej oportune konservi la ĝisnunan staton de la du organizoj sed ne ŝanĝi provizore nian statuton kaj atendi, ĝis la konstitucio donos definitivan formon al rilato inter slovakoj kaj ĉeĥoj en la komuna ŝtato. Tiu propono estis akceptita ĉiesvoĉe.

6. Elektoj. La prezidanto informis, ke per lotumado kaj ekŝigo vakiĝis triono de postenoj. La komitato proponis kandidatojn kaj estis ĉiesvoĉe elektitaj dr. A. Pitlik, Fr. Buhr, V. Špŭr, Jan Molnár, Vuk Echnert komitatanoj kaj Th. Kilián, Vl. Slaný vickomitatanoj. Komitatanoj sendataj en centran komitaton de la lokaj grupoj estos enskribitaj en la unua komitata kunveno; ĝi ankaŭ dividos la funkciojn kaj direktadon de komisionoj.

7. Liberaj proponoj. a) Peti, ke sinjoro prezidento akceptu en aŭdienco nian delegacion, kiu dankos lin pro lia favora sinteno al nia celado kaj petos lin pri konsilo (Th. Kilián). Akceptita ĉiesvoĉe.

b) Peti ministerion de informoj pri subvencio (A. Malik). Akceptita ĉiesvoĉe kontraŭ unu voĉo.

c) Ceteraj venintaj liberaj proponoj estis transdonitaj al la komitato, kiu ilin esploros.

Prezidanto finis la kunvenon per danko al partoprenantoj pro la laboro, kiam ili dediĉis al nia afero, kaj el kiu rezultis kontentigaj rezultoj kaj li esperas, ke rezultoj venontaj estos ankoraŭ pli bonaj.

Prezidis A. Malik.

Protokolis A. Tarantiková.

kaj belaspekta E-literaturo daŭris dum ambaŭ fojoj pli ol semajnon kaj helpis al nia klubo en la unua okazo: efike propagandi la lingvon dum la somera urba fremdultrafiko kaj en la alia okazo: sukcese ĝi helpis havigi interesulojn pri la komencanta kurso en ŬRO, gvidata de s-ano Jos. Vondroušek.

Dum la aŭtuna kaj vintra periodoj efektiviĝis nia klubo aperigon de la programo de siaj regulaj mardaj kunvenoj. Ambaŭ programoj, ĝis nun aperintaj, efike montris, ke vere eblas alt-niveligi la agadon dum la klubaj kunvenoj kaj starigi tiamaniere ilian kelkfoje eĉ allogan signifon. La regulaj klubaj programoj celas ne nur havigi spiron por la klubaj kunvenoj, sed precipe krei el ili ne-malhav-eblan parton de l'societa vivo de ĉiu samideano en Brno.

El la gazetoj, legataj kaj abonataj de niaj klubanoj krom Esperantista kaj Esperanto Internacia estas menciindaj: Heroldo de Esperanto, Sennaciulo, Internacia kulturo, Literatura mondo, La Praktiko, Espero katolika, Slovaka esperantisto kaj de tempo al tempo el Sud-Afrika alvenanta Libera Tribuno.

Dum aŭtuno fariĝis Brno grava kunveno de la reprezentantoj de la ĉeĥaj kaj slovakaj samideanoj kaj estis pritraktataj komunaj gvidaj asociaj aferoj dum la ĉeesto de kelkaj nia-urbaj komitatanoj kaj de la Asocia prezidanto Adolf Malik.

Komence de aŭgusto okazis en Brno Tutŝtata ekspozicio de poŝtmarkoj, kiun partoprenis nia klubo per la havigo de poŝtmarkoj: rusaj, brasilaj kaj per esperantlingva materialo pri la poŝtmarkoj, kiun preparis s-ano A. Nečas.

En la loka gazetaro de Brno aperigis nia klubo entute pli ol 100 pagitajn anoncojn, propagandantajn Esperanton. Ekde septembro posedas nia klubo regulajn propagandajn reklamojn en ĉi tiuj kinejoj: Alfa, Metro, Stadion, Moderna, Adria, Studio, Lucerna, Elektra, Union, Jas, Hvězda, Sokol-Obránv, Sokol-Heršpice kaj Sokol-Řečkovice.

En la kolektado de petskriboj akiris nia klubo nombron de 2300 pecoj. Nia klubo estas plue ankaŭ membro-subtenanto de PSMU.

Komence de oktobro estis komencita E-kurso en ŬRO, gvidata de mi. La nombro de ĝiaj partoprenantoj estis 42. Ĉiuj gekursanoj fariĝis anoj de la E-klubo. La kurso estis finita per solena kursfina festo kaj fotografado. La solena vespero, ĉeestata de pli ol 120 personoj, helpis efike plifirmigi por-Esperantajn poziciojn en Brno. En ĝia kadro okazis ekspozicio de 240 E-libroj, 2000 E-leteroj el eksterlando kaj de diversaj esperantaĵoj. Entuziasman aplaudon vekigis longega parolado de s-ano prof. Th. Kilián, aŭtoro de la lernolibro, laŭ kiu la kurso estis gvidata, kaj la parolado de ĝen. sekretario de ŬRO s-ro R. Ulrich, de samideanoj Vondroušek kaj Ambrož. Inter la honoraj gastoj de la vespero estis registara konsilanto Ing. J. Mazel, kies filino, f-ino Zorka Mazlová, radio-sopranistino kaj eminenta kurso-partoprenintino, kantis ariojn el la Vendita fianĉino de B. Smetana kaj el Najado de A. Dvořák en la traduko de dr. Pumpr kaj Slovakon kanton de K. Kovařovic dum la akompano de la teatra dirigento s-ano Vilibad Scheiber. Ĉiuj gekursanoj ricevis kvalifikan ateston laŭ la antaŭaj skribaj ekzamenoj. La kursgvidinto, same kiel la organizintoj de la vespero estis rekompencitaj per malavaraĵ kaj abundaj donacoj de la dankemaj gekursanoj. La kurso estas daŭrigata kiel kurso por progresintoj kun 48 personoj.

12-an de februaro estis komencita kurso ankaŭ en kunlaboro de ŬRO, gvidata de s-ano Vondroušek. Nombro de la partoprenintoj en la unua leciono estis 22 personoj. Ĉi tiu kurso eminentiĝas per la fakto, ke ĝin anticipis anu el la plej grandaj kampanjoj, entreprenitaj en Brno. Okaze de ĝia efektiviĝo estis presataj kaj aldonataj al la ĵurnalo Ĉin 10.000 ekzempleroj de la propagandfolioj pri Esperanto kaj la movado.

De s-ano Vondroušek estis samtempe gvidata E-kurso en la virina pedagogia instituto kun partopreno de 12 kursaninoj.

En Židenice komencis gvidi kurson en aŭtuno s-ano R. Nečas kun 26 partoprenantoj. Sukcesplene kreskas la movado en Židenice, kie la kursgvidanto kun s-anoj Sedlák kaj Falta prizorgas kelkajn surstratajn kestetojn, efike utilantajn por propagandaj celoj.

E-kurson en la loka Oběžník odbor. organizace dopravních zaměstnanců města Brna gvidas kluba membro s-ano Hubert Slavík.

En la kluba korespondado estis forsenditaj 241 sendaĵoj literaj kaj pli ol 500 presajoj. Alvenis 139 sendaĵoj. La korespondado estis plei parte gvidata de kluba prezidanto s-ano Vondroušek. — Gazeta servo estis gvidata de s-ano J. Kořínek en la gazetoj: Ĉin, Svobodné noviny, Národní obroda, Slovo národa kaj Rovnost.

Dum la komitata kunveno de E-klubo en Brno, la 26-an de februaro 1947 estis elektitaj: kiel prezidanto Josef Vondroušek, vicprezidanto: Frant. Bačura, 1-a sekretario: Jan Geryk, 2-a sekretario: Jiří Kořínek, kasisto: Adolf Nečas, bibliotekistino: Nelly Zitová, komitatanoj: Marie Adamcová kaj Rudolf Nečas, revizoroj: T. Borkovec kaj A. Potůček, anstataŭantoj: Josef Ambrož kaj Fr. Sýkora. Dum la pasinta jaro estis enspezitaj 21.000.— Kĉs kaj elspezitaj, ĉefe por propagandaj celoj 17.000.— Kĉs. Esperantista klubo en Brno konsistas nuntempe el 115 pagintaj membroj. Jan Geryk.

Ĉeská Lípa. — Loka grupo Asocia estis fondita la 10-an de februaro en fonda kunveno, kiu elektis prezidanton Josef Hanuš, oficialon de fervoioj (str. Kožnerova 1279), sekretariojn Teo Novotný, vicsekretariojn Vlasta Vondroušová, kasiston Hruška, gazetiston Karas, redaktoron de Stráž severu, propagandiston Pařízek, bibliotekiston Chalínský, protokoliston Pičová, raportanton pri klerigo Srb, raportanton pri skoltaj aferoj Old. Havel, revizorojn Veselý kaj Kotek. La nova klubo kunvenas ĉiumerkrede en restoracio Zlatý bažant. La kunvenon partoprenis s-o Blecha el Liberec, kiu parolis pri la organizo. — La nova klubo de nia celado estu salutita!

Hradec Králové. — Jarkunveno de la E. K. la 28-an de februaro elektis ienan komitaton: Prezidanto Fr. Pvloun, vicprezidanto A. Tobíáček, sekretarioj J. Vitek kaj J. Ořenášek, kasistoj Fr. Sobíšek kaj V. Kroulich, disaŭdiĝaj referantoj M. Ořenášková kaj Vl. Sláma, komitatanoj Tuch, Brankvtl, Bílek, dro Jakubec, Kratochvíl, Kučerová. Revizoroj Beran kaj Dolanský. Kotizo 103 Kĉs rojare. Kunvenoj klubaj nun vendrede en kafejo Národní. Kluba bulteno aperigis novan numeron, bele ciklostilitan.

14 paĝoj, kun ĉehlingvaj informoj efektive instigaj kaj informaj. Estas tie tuta paĝo de membroj-komercistoj (61 nomoj).

Karlovy Vary. — La regulaj kunvenoj de la loka grupo de EACSRO okazas nun ĉiun jaŭdon je la 18.30—20.30 horo en la klubejo en domo Charita, Moskevská strato 23. — La gesamideanoj, alvenantaj en nian urbon, ricevos ĉiuspecajn informojn ĉiutage de la prezidanto de Loka E-grupo, estro de la domo „Kosmos“, Zahradní-strato 41. En tiu ĉi domo troviĝas t. n. „Esperantista hejmo“, kie la gesamideanoj trovos konvenan tranoktejon kaj loĝejon dum sia restado en Karlovy Vary. — Dum nunaj tagoj ni havis la plezuron saluti en nia rondo la unuan E-gaston en tiu ĉi jaro, la konatan E-pioniron s-on Josef Friedrich el Brno, kiu dum sia 3-semajna kurac-restado pliiinteresiĝas niajn kunvenojn per rakontado de spertoj el sia riĉa esperantista vivo.

Liberec. — Regiona ĵurnalo Stráž severu ĉiumarde dediĉas al nia movado konstatan rubrikon. Ĝi estos nia regiona informilo. La redaktanto de la rubriko estas s-ro Ing. K. Fanta en Liberec. Na bojišti 14.

Malacky. — Studentoj fondis Esperanto-rondon.

Náchod. — Katolika aĝado aranĝis la 30-an de marto je la 15-a horo en la Urba teatro prelegon de prof. Jan Filip pri lia vojaĝo tra Nederlando titolitan „Nederlando en la laboro kaj preĝo“.

Ostrava-Radvanice. — E. K. Nova vivo okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 4. II. 1947 en ejo de Departementa konsilantaro (Obvodní rada). La komitato restis sen ŝanĝo. La kluba vivo vigliĝas nur malfacile sekve de tio, ke nur duono da membroj loĝas en Radvanice, kaj ĝis nun ne estis konvena kunvenejo. La klubo denove abonos revuon „Esperantista“ por loka publika legejo. Kelkaj membroj (speciale s-o Taraba) partoprenas kluban vivon en Ostrava (Fenix), s-o Staňura kunlaboras en Esperanto-rubrikoj en gazetoj kaj en radio (9 esperantaj kaj 2 ĉehaj priesperantaj prelegoj). La klubo ricevis permeson de Obvodní rada por povi kunvenadi ĉiulunde vespere en ĝia domo. Tiamaniere estas fine kontentige solvita la krizo, kiun la klubo suferis. De nun denove komencos regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj, kiujn ankaŭ partoprenados studintoj de Esperanto-kurso en Radvanice kaj samideanoj de ĉirkaŭaj kluboj. AST.

Ostrava-Michálkovice. — La 6-an de marto ĝisvivis s-o Josef Dubný sian 80-an jaron. Maljuna, ankoraŭ ĉiam vigla pioniro de Esperanto en Silezio, estis antaŭ kelkaj jaroj grave trafita de la sorto — li perdis vidpovon. Ĉi tiu malfeliĉo ne rompis lian viglan menson. S-o Dubný dediĉas sian atenton al Esperanto-vivo kaj estas membro de kluboj en Ostrava, Radvanice, de Asocio, IEL ktp. Ne povante mem legi, li atente aŭskultadas esperantajn radioprogramojn. E-librojn en sia biblioteko li ekkonadas palpe. Al siaj gastoj li rakontadas siajn spertojn el E-vivo, kiuj estas tre riĉaj kaj interesaj. Esperanto estas por s-o Dubný pli ol religio: se renkontas sin du samreligiaj diverslingvaj ili ne kapablas interkompreniĝi, se ili ne scias komunan lingvon. Esperantistoj kapablas interkompreniĝi tuj. Vizitoj de s-oj faras al s-o Dubný grandan plezuron. Gesamideanoj el nia regiono, ne forgesu tion! — Ni deziras al la jubileanto sanon kaj ankoraŭ multajn kontentajn jarojn da vivo. AST.

Radio Ostrava. — Krom regulaj Esperanto-programoj disaŭdiĝis la stacio Ostrava du ĉehlingvaj prelegoj de s-o A. Staňura: 15. X. 1946: Kial Esperanto? kaj 26. XI. 1946: Ni restos fidelaj al nia hejmo (pri E-korespondado).

Ostrava-Vitkovice. — 6. I. 1947 malfermo de kurso en Učňovský domov por 53 p. Instruas Vl. Slaný ĉiulunde je la 16-a horo. Organizanto estas Učňovský domov Vitkovických železáren (instituto por metilernantoj de la Feruzinoj de Vitkovice).

Pardubice. — La 5-an de februaro 1947 okazis la ĝenerala kunveno de la klubo „Dro Schulhof“ en la klubejo de hotelo „Veselka“, solene ornamita per la esperanta flago, bildo de nia Majstro kaj multaj afiŝoj kaj reklamiloj. Unuanime estis elektitaj: R. Veverková prezidantino; A. Jandík vicprezidanto, F. Nálevka sekretario, lia anstataŭanto J. Večeře, s-ino L. Malá kasistino, f-ino A. Boušková bibliotekistino, L. Rýznar arhivisto, anstataŭanto de

du lastnometaj funkciuloj P. Bukovský, kaj J. Hofman kaj O. Zeman revizoroj. — En liberaj proponoj s-ano Nálevka motivas detale starigi konstantan „laboran komitaton“, prizorgontan necesan laboron propagandan eĉ organizan. La propono akceptita. Tuj aliĝis s-anoj: s-inoj Veverková, Malá, Kuncířová, Michalová, f-ino Boušková, s-anoj Jandík, Nálevka, Večeře, Rýznar kaj Heřman. Plue s-ano Nálevka proponas instruadon de interesuloj antaŭ klubaj kunvenoj, nome de la 7-a ĝis la 8-a horo vespere en la hotelo „Veselka“. Lasta propono de s-ano Nálevka koncernis kluban organizadon. Li rekomendas, ke la komitataj kunvenoj okazu regule unufoje dum la monato, plej bone en la unua merkredo, ĉar sekve de tio la klubo ŝparos je invitiloj. Ankaŭ tiu ĉi propono estis akceptita de ĉiuj ĉeestantoj. S-ano Jandík iniciate de nia centro proponas kaj subtenas ŝanĝon de statuto koncerne organizadon de anoj en Asocio. Estis decidite, ke ekde 1-a de januaro 1947 estiĝas ĉiu ano de la klubo samtempe ano de la Asocio. Laŭ tio la membraro de klubo konsistas el aktivaj anoj, kiuj pagos 90 Kčs po jaro (kun ricevo de la „Esperantista“) kaj membroj-amikoj, pagantaj minimume Kčs 36.—

Poproč, okr. Moldava n. B. — Kurson de 15. XI. 1946 ĝis 28. II. 1947, 50 horojn, partoprenis 10 p. Post finiĝo de la kurso ĉiuj fariĝis SES-anoj. Regulaj kunvenoj ĉiulunde kaj ĵaude en popola lernejo. Instruas kaj gvidas E. Grich, loka delegito de SES.

Šternberk. — La 17-an de januaro komencis kurso de Esperanto, al kiu aliĝis 26 partoprenantoj. Gvidas distrikta peranto Ant. Harna. Je la unua leciono alparolis la partoprenantojn la distrikta kultura inspektoro s-ro Michal, kiu rekomendis al ĉiuj diligentecon kaj persistemon en la lernado ĝis la fino de la kurso.

Teplice-ŝanov. — Ĉeĥa prelego „Kion hodiaŭ proponas Esperanto al la mondo?“ estis 28. XII. 1946 en hotelo De Saxe, aranĝita de la prepara komitato de la Loka grupo. La 5-an de marto komencis kurso por 30 p. en Lernejo de modernaj lingvoj, gvidas A. Košťál, kurso daŭros 3 monatojn. La lernejo invitas al kurso per tre bele presitaj flugfolioj. Pri la kurso informis 6 ĵurnaloj kaj la urba radio-disaŭdiĝo.

KRONIKO ENLANDA

Ekzamenoj pri Esperanto ĉe Ekzamena komisiono de Esperanto-Asocio en ĈSR okazis la 29-an de marto 1947 en Praha en ejoj de la Labor-lernejo ŬRO je la 19—23-a horo. Anoncis sin ĉe tiu kunsido al ekzameno unuagrada (pri lingva scio de E.) 2 kandidatoj (1 viro, 1 virino), al la duagrada (pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj) 4 kandidatoj (3 viroj, 1 virino). Al la ekzameno prezentis sin 5 kandidatoj. La hejma tasko de la neveninta kandidato (de la komisiono aprobita) validas por plua kunsido.

Ekzamenis du ekzamenaj senatoj. Unua (por ekzameno unuagrada): Prof. Josef Kožený prezidanta, Rudolf Hromada, Oto Ginz. Dua (por ekzameno duagrada): Dr. Stan. Kamarýt prezidanta, Dolfa Bartošík, Inĝ. Lad. Krajč, prof. M. Lukáš. Skribajn taskojn klasifikis Dr. Tomáš Pumpř.

Rezultato de la ekzamenoj estis la jena:

Diplomon pri lingva scio de Esperanto ricevis:

Jiřina Bendová, kateĥistino de ĉs. eklezio en Havlíčkův Brod.

František Mílek, tipografo en Karlovy Vary.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

Jaroslav Bujas, instruisto en Ostrava-Vitko-

Turnov. — La unua kunveno en la estinta jaro revivigis la esperantistan vivon en nia urbo. Multaj maljunaj esperantistoj transloĝiĝis en apudliman regionon. La sekretariino de la Klubo f-ino Salmonová rememorigis la antaŭmilitan laboron kaj la lastajn momentojn en nia urbo dum la okupacio. En la amika interparolado oni diskutis pri propagando de nia lingvo. Pro tio estis elektitaj novaj funkciuloj: Prezidantino Sláva Valešová, edzino de prof., sekretariino f-ino M. Salmonová, kasisto Fr. Matějec, propagandisto faka instr. Alois Bobek. Kurson por la novaj esperantistoj gvidas s-ano K. Solc el Mladá Boleslav, 34 partoprenantoj. En la regiona gazeto „Pojizerské listy“ gvidas ĉehlingve esperantan rubrikon fakinstruisto Alois Bobek sub titolo „Tra la Esperanto-vivo“. Sur la Placo de Masaryk estas unua anonckesteto.

Uničov. — La 1-an de decembro 1946 amika kunveno de samideanoj el la distrikto Šternberk. Parolis esperantlingve kaj ĉeĥe s-oj Morko Jurič el Hradečná kaj Ant. Harna, distrikta peranto el Šternberk. De la kunveno estis forsendita al la radiostacio Praha petskribo por disaŭdiĝi Esperanto-kurson, subskribita de 30 personoj. S-o M. Jurič gvidas nun kurson, al kiu aliĝis 22 personoj, inter ili la urbestro s-ro Hošek, kiu fervore subtenas la movadon.

Vodňany. — S-o Josef Slepíčka, prezidanto de loka E-klubo, komencis instruadi la 10-an de januaro 1947. La kurson vizitas 13 p., ĝeĵunuloj 17—26-jaraj, en loka klubejo „U Slepíčků“ marde kaj vendrede je la 19-a horo. — E. K. ekspozicias en la montra fenestro de asekurejo „Slavia“ de la 30. XII. E-literaturon, 60 esp. librojn, inter ili verkojn de Zamenhof, verkojn tradukitajn el la franca, angla, rumana, itala, nederlanda, pola, rusa, sveda lingvoj, krome tradukojn el la ĉeĥa (Homo de Dio, La blanka malsano, Bukedo, Mi en li, Tridek jarojn en la ora nordo, Du noveloj), ĉeĥajn lernolibrojn, poŝtkartojn atp.

Zbiroh. — Post informa prelego la 26-an de januaro malfermis Loka kleriga konsilantaro kurson la 2-an de februaro en burĝa lernejo. Kurso daŭros 3 monatojn, kurskotoz Kĉs 80,—, studentoj kaj metilernantoj 40,—. Instruas konata vojaĝanto Josef Pech.

Zlín. — Kurso en Laborlernejo ŬRO depost 21-a de februaro 1947 gvidata de faka instruisto F. Bláha.

vice (Instruplano por E. en la tria klaso de la burĝa lernejo, du horoj semajne).

Jiří Koříněk, ĉefoficisto en komerco en Brno (Argumentoj por akuzativo en Esperanto).

Marie Schimmerová, korespondistino en Ŭpice (E. en komerco).

Ce la unuagrada ekzamenoj estis donitaj notoj po unu „eminente“ kaj „bone“, ĉe la duagrada du „tre bone kapabla“ kaj unu „kapabla“.

Ĉiuj ekzamenitoj akceptu niajn sincerajn gratulojn pro ilia sukceso kaj dankon pro ilia sin dediĉo al la lingvaj studoj.

Sveda lingvisto en Praha. Revenante el Rumanio haltis en Praha Lombard, profesoro de latinidaj lingvoj en la universitato de svedlanda Lund. Laŭ invito de universitato de Praha li parolis tie ĉi la 8-an de marto al la temo „Lingvo kaj la socio“. Profesoro Lombard parolis — en franca lingvo — pri la multlingveco eŭropa kaj tutmonda kaj skizis ĝiajn sekvojn proksimume laŭ esperanta vidpunkto. Li menciis la ekziston de la supozata pralingvo eŭropa kaj raportis pri la maniero, laŭ kiu angla sciencisto de li ne nomita proponis reveni al ĝi. Ĉiu el la tri ĉefaj lingvogrupoj eŭropaj, la latinida, ĝermana kaj slava faru por si unu komunan lingvon, kiun akceptos ĉiuj anoj de la koncerna grupo. El tiuj tri lingvoj fariĝos laŭ atendo de la angla lingvisto eble post du jarcentoj lingvo tut-eŭropa. Prof. Lombard ne trovas verŝajna la efektiviĝon de tiu fantazia plano, kvankam li asertas, ke ekz. dano kun svedo povas tute libere interparoli, ĉiu per sia lingvo. (Ĉu prof. Lombard pravas? Rim. de la redakcio.)

Li menciis la ekziston de Esperanto, cetere neniel sin

esprimante pri ĝi, sed li trovas solvon de la multlingveco sole en lerno de alinaciaj lingvoj, ĉar kiel diras franca proverbo: Ĉion kompreni estas ĉion pardoni.

Tiel finis prof. Lombard, scienculo de granda famo, sian paroladon aŭskultatan de gravaj lingvistoj profesiaj. Per sia silento kaj aplaŭdo ili montris sian konsenton. Ne estis donita okazo aldoni nek refuti ion, kvankam estus prezentablaj pluraj argumentoj, kiuj montrus la problemon en aspekto alia ol ĝin prezentis prof. Lombard.

Esperanto-fako ĉe skolta centro Junák aperigas ĉeĥlingvajn cirkulerojn en Praha II, Havlíčkovo 28, gvidatajn de Frant. Buhr kaj St. Lešinger.

Aŭroro, organo de la Blindula esperantista movado en Ĉeĥoslovakio, reaperas depost jaro 1946, dumonate bone Braile-presita, redaktata de Vuk Echtner en Praha 66. Enhavas artikolojn diverstemajn, poemojn, glosojn, angulon por komencantoj, angulon por progresintoj, ŝercojn, proverbojn ktp. Eldonas ĝin Societo „Ĉeĥa blindula prezo“ en Praha. Reapero de tiu ĉi grava gazeto estu salutita plej sincere. Kaj estu salutita ankaŭ la persisto de ĝia redaktoro, kiu denove ekfosis sian sulkon jam longe fosatan de li!

Slovaka esperantisto aperigis en jaro 1946 du kajerojn broŝurformajn. En jaro 1937 ĝi komencis aperadi en Trenčín, redaktata de E. V. Tvarožek kaj Ján Lamačka. En fino de marto aperis du kajeroj po 16 paĝoj numeritaj po du numeroj, tipografie tre bele faritaj. Abonprezo 60 Kčs.

Slovaka Esperanto-Societo transigis sian organizan fakon al Trenčín, kie ĝin gvidas s-o Ján Lamačka, strato Kukučínova 1524. „Informoj de SES“ direktas la esperantistan vivon en Slovakujo.

RADIO-PRAHA

Informu afable viajn eksterlandajn korespondantojn pri la nunaj horoj kaj ondoj. Ili estas:

L u n d e kaj ĵ a u d e je la 22,50—23 horo, ondo 470 m (Praha I).

Ĉ i u t a g e : 1. je la 17,30—17,45 h ondo 31,41 m kaj 1935 m.

2. je la 23—23,15 h, ondo 49,92 m.

De la 20. aprilo Ĉeĥoslovakio enkondukas la someran horaranĝon. Sekve de tio niaj programoj estas aŭdeblaj je unu horo pli frue.

La programoj, elsenditaj lunde kaj ĵaude:

2. I. Hromada: Radio-revuo kun informoj el nia movado.
6. I. Malík: Semajno en Ĉeĥoslovakio.
9. I. Král: Novjara saluto.
13. I. Malík: Semajno en ĈSR.
16. I. Šimon (Mařík): Skolta movado en ĈSR.
20. I. Malík: Semajno en ĈSR.
23. I. Raportaĵo pri teatraĵo: Amo, spito kaj morto, de E. F. Burian, el teatro D 47 en Praha (Hromada).
27. I. Mařík: Studentaj informoj.
30. I. Šupichová: Virinoj en la Esperanto-movado.
3. II. Malík: Semajno en ĈSR.
6. II. Hromada: Radio-revuo de Praha: Kio nova en la movado.
10. II. Malík: Semajno en ĈSR.
13. II. Hromada: Letero al Petro de Julius Fučík.
17. II. Malík: Semajno en ĈSR.
20. II. Hromada: Pri le ĉeĥa sukero.
24. II. Mařík: Informoj por studentoj kaj junularo.
27. II. Šupichová: Ĉeĥoslovakaj patrinoj vokas!
3. III. Malík: Semajno en ĈSR.
6. III. Hromada: Radio-revuo de Praha (informoj el nia movado).
10. III. Malík: Semajno en ĈSR.
10. III. Stacio Praha II. ondo 270 m elsendis specialan programon pri la Printempa foiro de Praha, je la 21,45 h (Hromada).
13. III. Hromada: Ĉeĥoslovaka industrio kontribuas al la civilizigo.
17. III. Malík: Semajno en ĈSR.
20. III. Mařík: Intervjuo kun bulgara studento Čičanov.
24. III. Neniu elsendo.
27. III. Hromada: Muzika festivalo en Praha 1947.
31. III. Mařík: Internacia junulara festivalo en Praha.

Laborkonferenco de esperantistoj nordboĥemiaj en Hradec Králové la 16-an de marto kunvenigis 66 partoprenantojn el 21 lokoj. Centran komitaton **Asocian** reprezentis prezidanto A. Malík. Ceestis ankaŭ bulgara samideano Konstadín Čičanov el Sofia. La konferencon salutis en nomo de la Loka nacia komitato prof. L. Staněk, estro de la Kultura ofico urba. La konferenco estis salutita de esperantistoj el Belgio, Danlando, Finnlando, Nederlando, Norvegio, Skotlando, Svedio, Svislando. El la enlandaj salutleteroj estis aparte aplaŭdata telegramo de slovakaj esperantistoj el Bratislava. La konferenco pridiskutis ĉiujn samtempajn problemojn de la movado. Estis senditaj saluttelegramoj al prezidento dro Edv. Beneš, ministroj Jan Masaryk, Václ. Kopecký, ŝtata sekretario Vlado Clementis kaj slovaka komisiito por interno. Sabaton antaŭ la konferenco estis amuza „Jozefa vespero“, kiu donis al la ĉeestantoj gustumi la veran, nedifektitan bonhumoron de la Hradecanoj, kiuj estas famaj pro tio, ke ili neniu plorigos. La gvidanto de la programo samideano Jozefo Vitek rikoltis laŭrojn ankaŭ sur tiu ĉi kampo.

LETERVESPERON

por 30 gekursanoj aranĝas Esperantista klubo en Liberec la 17-an de majo 1947. — Bonvolu sendi leterojn kaj salutpoŝtkartojn al la sekretario de la klubo: S-ro Ladislav Blecha, fervojoficisto, Liberec, nádraží, zásobárna ČSD.

La Radio-komisiono de nia Asocio denove atentigas, ke ĝi akceptas proponojn pri la paroladoj lundaj kaj ĵaŭdaj. Sufiĉas sendi unue ĉeĥan tekston. La propra parolado en esperanto havu maksimume 85 liniojn, kiuj respondas al 8¹/₂ minutoj. La resto estas rezervita per enkonduka kaj fina anonco de la stacio. Anstataŭ la samideanoj neĝantaj en Praha kaj ne povantaj mem paroli antaŭ mikrofono, diros ilian parolon samideano de Praha. Por la prelegoj la radiostacio donas honorarion.

La mallong-onda programo.

Ĝi estas bone aŭdebla je la 17,30 ankaŭ per la longa ondo ĉeĥoslovaka 1935 m. Ĉiun sabaton oni elsendas informojn el la esperanto-movado kaj respondojn al niaj korespondantoj, ĉiun dimanĉon iun literaturan temon. La cetera programo estas informoj pri la nuna vivo en Ĉeĥoslovakio, kultura, ekonomia kaj politika. Centoj da leteroj atestas, ke ili estas aŭskultataj kun granda intereso.

Aŭskultu disaŭdigon el fremdlando!

Radio pola:

Ĉiumerkrede je la 22.10 Met, ondo 49,06: Prelegoj kaj informoj pri Pollando. Skribu al: Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.

Radio nederlanda:

La nederlanda Radio-Unuiĝo V. A. R. A., Hilversum, Postbus 175. Kvankam diversaj dissendoj okazas en la nederlanda lingvo (pro motivoj propagandaj) tamen oni donas mallongan resumon en Esperanto. Petu disaŭdigon de informoj pri Nederlando tute en esperanto.

3. Majo: Verda kabaredo, ondolongo 301 m.

7. Junio: Esperanto serve de la laborista movado, 301 m.

5. Julio: Esperanto 60-jara, ondo 415 m.

2. Augusto: Dialogo, 415 m.

6. Septembro: Intervjuo, 415 m;

ĉiam je la 16.10—16.25 horo Met (mezeŭropa tempo).

RICEVITAJ LIBROJ

En tiu ĉi rubriko, kiun ni en la lasta jarkolekto nomis „Novaj libroj”, ni enskribos ĉiujn presaĵojn ricevitajn. Ni klopodos ne sole enskribi, sed informi kritike niajn legantojn pri la valoroj de libroj. Ŝajnas al ni, ke jam tempo estas matura por tio, ke ni ne ĝoju pro simpla apero de iu esperantaĵo. Ni nepre devas postuli kvalitojn estetikajn aŭ instruajn, kiuj pruvas, ke la apero de la presaĵo estis bezona pro io. La impresoj, kiuj ricevas el la literaturo aperanta post la milito, ne estas provizore tro edifanta. Ni kredas optimisme, ke laŭdo de laŭdindaĵo kaj malakcepto de senvaloraĵo povas iom utili al kresko de nivelo de la esperantista literaturo.

Antonio kaj Kleopatro. Tragedio en kvin aktoj de William Shakespeare. El la angla lingvo tutproze tradukita de Stephen A. Andrew. 1947. The Esperanto Publishing Co LTD. Rickmansworth, Herts., Anglujo. Paĝoj 96. Broŝurita 2 ŝ. 6 p., afranko 2 p. aŭ 11 respondkuponoj. — La dramoj de Shakespeare estas plenaj de poezio. Unu el rimedoj, per kiuj la poezia efiko estas efektiva, estas la lingvaĵo de la poeto. La heroecoj kaj heroaĵoj estas dirataj en lingvaĵo versa, la vulgaraĵoj kaj vulgarecoj estas ofte en prozo. Sed la stilo mem, ne sole verso-prozo, vidigas kaj aŭdigas la diferencon, ĝi montras la diversan sintenon de la rolantoj al ideoj kaj faktoj. Jam por tio proza traduko malfacile redonas impreson kaj esencon de la drama poemo. Krome la poeto ofte uzas vortludaĵojn el diversaj parolturnoj, li enmetas iam senŝanĝe, iam transformiĝante, travestie kaj ironie, proverbojn kaj popolajn aŭ slangajn parolturnojn. Imiti tion sen versoj estas preskaŭ ne eble. Precipe en prozo tiom griza, kia estas tiu de sinjoro Andrew. La traduko mem estas ja fidela al la senco, ja ĝi verŝajne estas tre laŭvorta. Sed la laŭvorteco estas la lasta, kion ni serĉas ĉe traduko de poezio. Ni nepre rajtas postuli redonon de la senco kun la suba tono, kiuj zumas kante sub ĉiu efektiva poezio. Kaj tiu ĉi tragedio ja estas poezioplena.

Sed krome: la lingvaĵo de la traduko per si mem estas strange malnoviĝinta. La tradukanto ŝajnas tute ne atenti, kion en la lasta jardeko antaŭ la milito alportis la skolo de Literatura mondo, kiu donis al Esperanto-poezio eblecojn tre grandajn, ne supozatajn pli frue. Kian sencan havas ĉe traduko de poeziaĵo tiom esenca ne atenti ilin kaj presigi verkon, kiu povis signifi ion en jaro 1910 sed ne nun.

Jam la nomoj de la rolantoj: Oni provis kun sukceso diferencigi la virinajn nomojn per finiĝo a. Neniu leganto supozis iam, ke temas pri adjektivo kaj bone komprenis ekzemple la titolon Maria kaj la grupo. Kiom bele estus, se ni legus en tiu ĉi libro Kleopatra, Karmiana, Irasa, same kiel oni povas legi Oktavja! La tradukanto volis verŝajne eviti ĉiujn modernajn esprimeblecojn kaj tradukadis kreante kunmetitajn vortojn malofte aŭ neniam renkontatajn en la literaturo. El tiaj vortoj havas la leganto ĝuon sole tian, kian havas la solvinto de rebuso. Ekzemple „glavon eningigu!” estas certe bone kreita vorto, sed ĝi taŭgas por komedio, povus ĝin diri pulĉinelo al dua pulĉinelo, sed ne Cezaro al Antonio. „Si povas fari ekpluvon” estas certe tre peza dirmaniero (p. 12), „supersataĉo” estas tro artefarita kaj ne bone komprenebla; eble „trosateco”. „Inda” neniam povas signifi honorigantan atributon. Pompejo povas esti honorinda kaj malhonorinda. Tro multaj kunmetaĵoj („Lepido flamkoloriĝis”) pligravigas la nekutimecon de la tekstoj. Sed estas ankaŭ kelkaj eraroj. „Si, sia” povas esti uzataj sole, se ili rilatas al subjekto en tria persono, neniam aliloke. El substantivaj radikoj oni ne povas ĉiam krei senpere verbojn. Ekzemple de okulo oni ne povas diri okuli aŭ okulaĉi. Se oni volas eviti „neologismon” gapi aŭ gapaĉi, oni nepre devas diri okulumi aŭ se oni nepre bezonas okulumaĉi. Simile de buko bukumi; se oni legas aŭ aŭdas bukita, estas malfacile tuj diveni la sencan. Tion oni povus diri imitante ekz. parolon karesan, patrino al infano kaj simile, sed ne Kleopatra parolante al Antonio antaŭ la batalo. Neniam oni povas diri, ke la dramo „verkiĝis”, ĝi nepre estis verkita de la aŭtoro, per si mem ĝi ne verkiĝis. Tiam strangan eraron oni trovas plurfoje. „Batstrui la dorson!” estas ankaŭ ekzemplo de tre stranga vortkunmeto (p. 67). Mi povus daŭrigi longe. Sed komprenu min bone: La traduko estas fidela al la originalo. Kiu legas ĝin atente,

legos la dramon, kvazaŭ li legus ĝin en la originalo. Tamen mankos al li la poema ĉarmo. La poemo ja pro tio estas poemo, ke ĝi estas verkita per lingvaĵo poezia. Kaj stranga afero: la tragedio pri Kleopatra estas tiom plena de poezio, ke eĉ la tiom griza traduklingvaĵo ne forrabis al ĝi ĉiujn poemajn ĉarmojn; eĉ en tiu traduko ĝin legante oni estas kortuŝata de konfliktoj inter viraj devo, ambicio, fideleco, organizado de la mondo kaj virinaj amo, sagaco, beleco, sindediĉo kaj perfido. La tipografia arango de la libreto estas tre bona. Tial ĝi tamen meritas legadon. Ĝi estos instrua por tiu, kiu volus kompletigi siajn sciojn pri lingvo de la angla poeto komparante originalon kun tiu ĉi traduko.

Kvara rapsodio. Redaktis Ferenc Szilágyi. Stockholm. Eldona societo Esperanto, Fack 19071 Stockholm 19. Paĝoj 48, 12×22 cm. Prezo 2 sv. kr. — Speco de jarlibro, la tria aperis antaŭ du jaroj. Laŭ la „Enkonduko” estas ĝia tendenco „montri kaj demonstri la vivon de Esperanto, ĝian ligiĝon al aliaj gravaj sociaj problemoj kaj aferaĵoj, esti interesa, varia sen malaltiĝo de la nivelo”. La pli grava el tiuj tendencoj devus esti la dua, ĉar vivon de Esperanto vidigas relative sufiĉe multaj presaĵoj. Sed tiun ligiĝon al aliaj samtempaj faktoj kaj tendencoj kulturaj tiu ĉi volumo ne demonstros sufiĉe konvinke. Sole la unua artikolo „Mondmoralo” de Szilágyi, raportanta pri kolektiva verko, redaktita de svedo Johan Hansson, estas de tiu speco. El 24 artikoloj plej multaj estas beletristikaj. El ili mi citu paĝon kun traduko el „Maksimoj” de La Rouchefoucauld, verkita de G. Waringhien, kaj poemon de Kalocsay „Interna ideo”. El la ceteraj artikoloj mi citu „La juĝo de la historio” de J. H. Rosbach, kiu diras en la fino: „Mitoj tre facile kreiĝas, precipe dum postmilita tempo. La nuna tempo estas tre mitkreema. Oni eĉ ne kredis, ke Napoleono estas mortinta! La mito jam ekzistas, ke Adolf Hitler ne estas mortinta, tiu iam amata kaj nun la plej malamata homo. Ĉar mitoj tiel facile aperas, kaj ĉar neresponecaj elementoj provas rekrei militemon, entuziasmon por uniformoj per laŭdego de „sistemo” kaj per panegiro de Hitler, la venkintoj devas esti tre atentaj, ke la historio havu nenian ŝancon por forgesi kaj senkulpigi.” Artikolo „Strangaĵoj el la besta vivo” de C. Stop-Bowitz ŝajnas al mi tre bona laŭ la temo kaj laŭ la formo same. Li provas enkonduki por virinseksuloj vorton „ŝio”, por virseksuloj „lio”. Al mi ŝajnas tiu propono tre akceptinda. — La arango de la libro estas tre plaĉa. Bedaŭrindaĵo estas sufiĉe multaj preseraroj. Grava manko estas foresto de iu ajn indiko pri jaro de apero; ĉe „jarlibro” des pli grava.

Premiaj romanetoj de konkursintoj 1947. The Esperanto Publishing Co Ltd. Rickmansworth, Anglujo. Paĝoj 96. Prezo 2 ŝ. 6 p., afranko 2 p. aŭ 11 respondkuponoj. — La libreto enhavas multajn mallongajn rakontetojn, elektitajn el granda nombro, kiun la eldonejo ricevis pro konkurso. Ili estas agrabla legaĵo kun temoj plej ofte naivaj, sed preskaŭ ĉiam legeblaj kun kontenteco. Ankaŭ la lingvaĵo estas preskaŭ ĉiam tre bona; la libreton oni povas rekomendi sincere al ŝatantoj de facila legaĵo.

Spegulo homarana, dediĉita al koroj maljunaj kaj junulaj de J. H. Erko. Senkatene redonis en Esperanto Vilho Setälä. 1946. Esperanto-Instituto de Finnlando. Paĝoj 32, 11×15 cm. Prezo afrankite 28 mk. — Juhana Erik Erko (1849—1906) estis finna poeto kaj probatalanto de ĉiuj humanecaj idealoj: popolklerigo, libereco, abstinenco, puraj moroj. Lia verketo versa „Finna hejma regularo” aperis en jaro ĉ. 1900 kaj celis vekti la popolon al morala forto en la „pasiva” senarmila defendo de ĝiaj juraj rajtoj kaj en batalado por la justeco. Nun estas ĝi prezentata al esperantista legantaro en broŝureto bibliofilie presita ruĝe kaj nigre kun ornamentaj desegnaĵoj de Akseli Gallen-Kallela. Laŭ vortoj de la eldonejo ĝi aperis unue por anonci estiĝon de Esperanto-eldonejo, due por esprimi deziron de la finna esperantistaro partopreni en la kunlaboro de la popoloj por kreo de paca kaj pli feliĉa homaro.

Aŭgusteno de Silva: Vivo de Zola. El la portugala tradukis Manuel de Freitas. Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49—1, Porto, Portugalio. Paĝoj 108, 20×13 cm. — Detala priskribo de la vivo kaj laborado de la fama

franca romanverkisto. Estas priskribataj liaj verkoj kaj liaj bataloj, precipe en la Dreyfus-afero. La eldonejo meritas dankon pro kuraĝo eldoni verkon, kiu, certe tre instrua, tamen nun, almenaŭ laŭ nia takso, ne estas tro aktuala. Certe jam problemoj de Zola-tempo perdis por ni aktualecon; kio restis, estas la modela klopodado de Zola, ke idealoj de justeco ne restu ideoj, sed fariĝu realaĵoj efektivaj. Tio estas ekzemplo ĉiam sekvinda. Tial legado de libro, kia estas tiu ĉi, ĉiam estas edifanta. La lingvaĵo de la traduko estas tre flua, samideanoj portugalaĵ akceptu gratulon al sia eldonejo kaj al si mem pro sia sindediĉo al temoj seriozaj kaj studindaj

Katalogo de oficialaj poŝtajoj kun esperanta teksto, kompilita de G. Saĝet, Elbeuf. Speciala numero (16 paĝoj, 17×25 cm) de Interligilo, organo de ILEPTI. Por 2 respondkuponoj liveras R. Filliâtre, Achères S. e. O., Francio. — Uzo de nia lingvo sur oficialaj poŝtajoj estas grava fakto, kiu ne estas sufiĉe konata inter la esperantistaro nek konvene utiligita. Estas ok ŝtatoj ĝis nun (Aŭstrio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Danzig, Hungario, Liechtenstein, Nederlando kaj Sovetunio), kiuj eldonis poŝtmarkojn aŭ poŝtkartojn kun esperanta teksto. Estas agrabla konstato,

NI LEGIS

Studenta fronto komencis aperadi en januaro 1947 en Sofia, eldonata de Studenta Esperanta Sekcio „Progresiva Studentaro“ ĉe Generala Popola Studenta Unio en Bulgario. Cefredaktoro Ŝterjo Kukuŝev. Adreso: Str. Car Ŝiŝman 11, Sofia. Prezo 1 ekz. 10 levoĵ aŭ 1 respondkuponon. La gazeto enhavas 8 paĝojn. Sur unua paĝo ĝi enpresas deklaron „Al tutmonda studentaro“. Ĝi rekomendas al ĉiuj studentaj organizaĵoj: 1. La lernadon de esperanto kaj ĝian utiligadon en la eksterlandaj rilatoj. 2. Akcepti esperanton kiel unu el la oficialaj lingvoj de ĉiuj studentaj internaciaj kongresoj, oficialaj organoj, raportoj, korespondado, fakaj entreprenoj, sportaj kaj turistaj renkontoj ktp. — Sur ceteraj paĝoj estas nemultaj informoj pri bulgara studentaro kaj pri „La entuziasma multflanka laboro de la studentaro de Zagreba universitato post la liberiĝo“. La informoj tie donataj estas konataj al ĉiu iom atentema leganto de ĵurnaloj. La redakcio devas klopodi ricevi informojn pri studentaj celadoj el pli multaj landoj kaj krome informojn multe pli interesajn kaj gravajn ol estas tiuj en la unua numero.

Ni akceptas libromendojn

Daŭras nun klopodoj pri renovigo de nia oficiala Librovendejo de EAĈSR, kiu, fondita ne longe antaŭ la milito, promesis fariĝi unu el la plej gravaj entreprenoj de tiu speco en la esperantista mondo. La invadintoj haltigis tiun evoluon. Kun la Asocio ili ĉesigis ankaŭ la librovendejon.

Tamen jam nun, antaŭ ol ni komplete refunkciigos nian librovendejon kun denova konvena ejo kaj kun konstante deĵoranta oficisto, ni akceptas mendojn de ĉiuj esperantaj libroj kaj gazetoj nun haveblaj de iu ajn eldono.

Bonvolu anonci al ni viajn dezirojn, kiujn ni laŭ nia ebleco plenumos. Kvankam ni por tempo ankoraŭ sufiĉe longa devos peti de la mendantoj paciencon (ne atendu nian korespondadon post via mendo), ĉar treege de esperantistaj libroj estas disvenditaj, ni tamen promesas atenti zorge ĉiun unuopan mendon kaj fari ĉion, kio estos dum nunaj cirkonstancoj farebla. Nia librostoko ĉiam kreskas kaj ni havas jam nun rilatojn kun la plej gravaj esperantistaj eldonejoj. Ni opinias necese diri ĉi tie, ke ni atentigas la regulojn de nia ŝtato kaj ni pagas en eksterlandon sole laŭ

ke inter ili la ĉeĥoslovakaj poŝtkartoj havas laŭ esperantista vidpunkto specialan valoron. La verketo de Saĝet estas utila kolekto de datoj cetere nefacile troveblaj. Tamen: En pluraj landoj oni povis mendi surpreron de poŝtmarkoj anstataŭ ilin surglui, sed per tio la poŝtajoj kompreneble ne fariĝis oficialaj. Ne estas tial ĝuste citi en la katalogo privatajn bildkartojn germanajn kun surprisita poŝtmarko. Inter datoj pri Ĉeĥoslovakio aperis jenaj eraroj: *M a z a r i k* anstataŭ ĝuste *M a s a r y k*, prezoidiko germane en heller anstataŭ esperante: *h e l e r o j* aŭ ĉeĥe: *h a l é ř ů*. Sub nro 123 la ĝusta teksto estas: Praha, esperantista centro en koro de Eŭropo. — Ni rekomendas akiron de la katalogo al jamaj interesuloj kaj al tiuj, kiuj deziras klopodi pri akiro de tiuj ĉi interesaj dokumentoj pri oficiala uzo de nia lingvo.

Tutmonda interŝanĝa adresaro, eldonata en Praha-Břevnov 514, aperigis en februaro 1947 unuan numeron de sia nova periodo. Sur 4 litografiitaj paĝoj ĝi enhavas 67 adresojn de personoj emaj interŝanĝi ion por kolektaj celoj. La enpresado de adreso kosta 10 Kĉs, por eksterlandanoj 3 respondkuponojn, por ekstereŭropanoj ĝi estas senpaga.

Die Weltsprache, lerngazeto por Esperanto, redaktata de Aŭstria Esperanto-Instituto, aperas trifoje monate (po 16 paĝoj) en 10.000 ekzempleroj, 15.000 specimen-ekzempleroj estis dissenditaj al ĉiuj lernejoj, sindikatoj, grupoj de la tri politikaj partioj, multaj fabrikoj, oficejoj kaj diversaj personoj. Tiel diras la letero, akompananta la provnumeron al nia redakcio. La gazeto petas adresojn de korespondemuloj, kiujn ĝi senpage publikigos. Niaj legantoj interesataj skribu al la redakcio en Wien IX/66, Rossauerlande 27.

Afrika revuo, la sola esperanta gazeto presata sur Nigra kontinento, komencis aperi en Casablanca (Maroko) kun artikoloj tre variaj, enigmoj, konkursoj kaj adresoj de ĉiulandaj korespondemuloj. Specimena n-ro 10 Kĉs, jara abono 75 Kĉs, pageblaj al EAĈSR.

leĝe kaj kun permeso de nia Nacia banko.

Ni konscias pri manko de ĉeĥaj kaj slovakaj verkoj instruaj (lernolibroj kaj vortaroj) kaj ni aktive subtenas ĉiun entreprenon, kiu ĝin forigos. Ni esperas, ke ni povos baldaŭ anonci interesajn eldonaĵojn el tiu fako.

Al la samideanoj kaj la grupoj, kiuj provas private komerci kun la libroj, ni direktas la peton, ke ili ĉesigu tiun agadon. Ili bonvolu kompreni, ke ankaŭ en tiu ĉi rilato estas necesa koncentriĝo de fortoj. Utiligante la ĝisnunajn spertojn ni rekreatu komune potencon librovendejon, bone servantan al la esperantistoj de la respubliko.

459 lokoj

Esperantista revuo por Esperanto en Ĉeĥoslovakio estis dum la jaro 1946 ekspedata al abonantoj en 459 lokoj de nia respubliko.

La cifero mem estas bela, sed vere interesa estas studo de la kelkpaĝa listo de tiuj lokoj. Nia provizora administranto faris denovan utiligan laboron, starigante tiun ĉi liston. Kiom da vilaĝoj kun nomoj al nemultaj konataj, kie unuopuloj vivtenas la esperantan flamon! Bela pruvo, kiel vere popola estas ĉe ni la movado.

Plia konstato: La apudlimaj regionoj esperantigis. Jen Liberec, Karlovy Vary kun preskaŭ imponaj nombroj de niaj legantoj, sekvas Cheb, Ustí nad Labem, Mariánské Lázně, Františkovy Lázně, Nový Jičín ktp. kaj ĉie ni nun trovas laborantojn por nia ideo. Jes, en iuj estis jam antaŭe „esperantistoj“, sciantaj la lingvon internacian, sed ili — hodiaŭ ni tion povas deklari — ne deziris kun ni iri antaŭen man' en mano. Estis esperantistoj germanlingvaj, kiuj krom malmultaj esceptoj rifuzis tiun kunlaboron kaj ne akceptis la etenditan manon. Kvankam en malgranda mezuro, tamen same maldolĉajn spertojn ni havis kiel havis nia respubliko ĝenerale pri la germanoj. Ni ne ŝatas rememori, sed ĉi tie ni foje devas menci, kiamaniere rifuzis la germanaj esperantistoj en nia lando la ripetitan inviton al kunlaboro kiel egaluloj kun egaluloj, kiom da fojoj ni renovigis tiun longan, por ni ofendan traktadon, dum kiu ni cedis ĝis plej ekstremaj limoj. — Ni observu prefere kun ĝojo, kiel esperantistoj de bona volo en tiuj lokoj iam germanigitaj nun dissemas novan semon, kiu espereble portos rapide fruktojn en kreskanta nombro da veraj samideanoj.

Ankaŭ ni observu la neeviteblan tajdon en nia movado. Lokoj iam famaj en ĉeĥoslovaka Esperantujo ŝajne dormas aŭ sole unuopuloj anoncas sin el ili. Ni atentis tiujn lokojn, ĉar ni ne ŝatus permesi, ke laboro tie uzita montriĝu vana. Kontraŭe aperis aliaj lokoj, novuloj en la movado, kun tre belaj nombroj da niaj legantoj. Ili eltenu kaj kresku!

Fine ni konstatu laŭ la nomaro, ke anoncis sin kiel abonantoj absolute ne konforma nombro de esperantistoj el lokoj, pri kies forta movado ni estas informitaj. Anoncante sin komplete en niajn vicajn, la samideanoj el tiuj lokoj pruvos, ke ili deziras konservi por sia hejmo la antaŭan signifon. Se ili deziras veni al la celo, ili kunigos siajn fortojn kun la granda civito de niaj legantoj.

Bona ĉeĥoslovaka esperantisto ne povas esti sen sia revuo.

Regiona ekspozicio de poŝtmarkoj en Pardubice kun esperanta ekspozicio

La klubo de filatelistoj en Pardubice aranĝos okaze de 25-jara datreveno de ekzistado jubilean ekspozicion de poŝtmarkoj la 22—29-an de junio 1947. La ekspozicion partoprenos la ministerio de poŝtoj, anoj de filatelistaj kluboj en Pardubice kaj Hradec Králové kaj el la tuta orienta Bohemio, t. e. kluboj kunligitaj en tiel nomita „Kunětická župa“.

Ĉar nia lingvo kaj filatelo estas ligitaj kaj E. ludas gravan taskon en internacia intersanĝado de poŝtmarkoj k. a., la Esperantista klubo en Pardubice decidis demandigi la filatelistan estraron, ĉu la esperantistoj povus ankaŭ partopreni kaj aranĝigi propran angulon kun la titolo „Esperanto kaj filatelo“. La ekspozicia komitato de la filatelisto klubo en Pardubice tre kompleze jesis kaj pruntedonis senpage necesan nombron de kadroj. Do nia klubo ekspozicios en tiuj ĉi kadroj la esperantistan materialon pri filatelo

kiel: esperantaj gazetoj, kiuj ekskluzive pri-traktas filatelon, esperantaj poŝtmarkoj eldonitajn okaze de famaj esperanto-okazintaĵoj (kongresoj, datrevenoj ktp.) kaj fine eksterlandan korespondadon, montrantan praktikan uzadon de nia helplingvo en kolektado. Tiamaniere nia klubo volas pruvi al vizitantoj, ke Esperanto servas kaj helpas al ĉiu branĉo de kolektado, speciale se temas pri eksterlando. La ekspozicion instalas s-ano F. Nálevka, direkcio de PTT, Pardubice.

Ni esperas, ke la esperantistoj de tuta regiono certe vizitos la esperantan ekspozicion kaj ke ili partoprenos proponatan kunvenon de esperantistoj el orienta Bohemio je la 22-a junio 1947 en Pardubice. Pli detalaj informoj sekvos. - Ná.

Jurnalista kunlaboro esperantista. Redaktoro Rich. G. Nielsen, Herlufsmagle, Sjælland, Danlando, vicprez. de Tutmonda Jurnalista Asocio Esperantista, starigis esperantan gazetaran oficejon por Danlando kaj serĉas ĉiuspecajn artikolojn por disvastigo en dana gazetaro. Pri detaloj skribu al s-ano Nielsen. Afranku filatele.

32-a Universala Kongreso de Esperanto en Bern promesas esti sukceso, se ni volas juĝi laŭ 1157 aliĝoj, alvenintaj ĝis nun el 30 landoj. Estas inter ili 38 kongresanoj el nia respubliko, sed ni timas iom, ke ne ĉiuj havos la eblecon ĉeesti, kvankam la Asocio klopodas ebligi partoprenon laŭeble plej grandan. Tamen nia Nacia banko estas prave tre severa dum la nuna, ĉiam ankoraŭ nenormala, tempo. Por seriozaj laborantoj en la movado estos la partopreno certe valora, sed ĝi alportas ankaŭ multan ĝuon, ĉar la Loka Kongresa Komitato (Bern, Bundesgasse 20) preparas kelkajn postkongresajn vojaĝojn tra la plej belaj regionoj svisaj. Kongresa kotizo estas 35 sv. frankoj, svisa vizo senpage.

Rondo de Danublanda Esperantista Junularo volas esti libera unuiĝo de progresemaĵoj, loĝantaj ĉirkaŭ Danubo, kiuj deziras sincere klopodi komune, ke ne povu reaperi faŝismo kaj novaj militoj. Ĝi havas interesajn planojn, ekz. por kreo de laborbrigadoj de esperantaj ĝejunuloj, kiuj partoprenu laboron similan al tiu ĉe la jugoslava Junularfervojo. La Rondon, kiu devas esti senkotiza kaj celas recipokan servon inter ĝejunuloj, administras provizore la hungara verkisto dro Jozefo Mohácsy, Budapest XII., Varáss u. 4. Li invitas al kunlaboro ankaŭ junularon ĉeĥoslovakon kaj serĉas en nia respubliko taŭgan anon por la venonta definitiva komitato. Interesuloj bonvolu kontaktigi.

Salutvespero el eksterlando okazis por la partoprenantoj de esperantokurso en Havlíčkův Brod (ĈSR) la 12-an de marto. La poŝto altransportis por ili 62 leterojn, p. k., p. i., prospektojn, librojn, kiujn forsendis gesamideanoj el 16 landoj. La gekursanoj prirespondas nun la korespondalojn. Tamen ni dankas ankaŭ per tiu ĉi sciigo al ĉiuj gesamideanoj, kiuj per siaj poŝtendaĵoj pruvis al niaj novaj gesamideanoj la eblecon de praktika uzo de nia kara lingvo. — Per libropremioj estis rekompencitaj jenaj eksterlandanoj: 1. Kaarlo Lehto, Helsinki, Finnlando (la ideo de la esperantomovado) per Ĉapek: La blanka malsano. 2. Karlo Hansen, Roskilde, Danujo (interesa perletera vojaĝo tra dana regiono kaj urbo) per Vladyka: Mi en li. 3. Ev Walsum, Alblaserdam, Nederlando (la ventmuel-ejoj en Holando) per Du noveloj. 4. Kayihan Bozkurt, Tarsus, Turkujo (petis esp.-librojn) per Herrmann: Fokso-Nukso. 5. E. Beatty, Cardington (Ohio), USA (89-jara samideano, kiu sendis kantlibron) per Vrba: Homo de Dio. —eto

NIAJ AKCEPTEJOJ (dua listo)

ps = persone tlf = telefone

Hluk.

S-ro Rudolf Borýsek, Hluk 56, tlf. poŝtkonto-ro, tuttage.

S-ro Jan Křivák, Hluk 489, tuttage.

Chomutov.

S-ino Aluŝ Hoffmannová, kaj samfamilianoj, str. Libušina, nro 12., tuttage.

Karlovy Vary.

S-ro Dir. R. Emmer, Domo Kosmos, str. Zahradní 41; pr. 22—14, 18 kaj plu; tlf. 2927.

S-ro Fr. Mílek, str. Koněvova 5; ps. 16—19.

S-ro Jiří Čechner, studento, Tuhnice, str. Moskevská 42; ps. posttgm.

S-ro Fr. Mašek, skolto, studento, str. Janáčkova; tlf. 3688.

S-ro A. Pilař, str. Okružní 8; ps. kiam ajn.

S-ro Míla Stíngl, studento; tlf. 2822.

S-ro Petr Tichota, Churchillova 5; ps. 8—14.

Kopřivnice.

S-ro Rudo Zanáška, tlf. Tatra 53.

S-ro Ludvík Gazda, tlf. Tatra 156.

S-ino Zdenka Gazdová, tlf. Tatra 87.

S-ro Alois Chasák, tlf. Tatra 444, ĉiuj en entrepreno Tatra, ps. 6—14 labortage.

Litomyšl.

S-ro Fr. Svoboda, oficejestro, n-ro 14.

Mladá Boleslav.

S-ro Karel Šolc, ps. str. Železná 41.

S-ro Karel Vrba, ps. str. Kupeckého 12.

Olomouc.

S-ro Albin Neuzil, ps. Husitská 12 en Olomouc XI.

S-ro Dro Vladimír Mohapl, laborejo Krajský soud, ps. 8—14.

S-ro Jaroslav Karhan, str. Ztracená 15, ps. 8—12 kaj 15—18.

S-ro Alois Kouřil, str. Polívkova 5, ps. 7—14; tlf. 716.

S-ino Marta Vadasová, str. Bořivojova 11; ps. kiam ajn.

Pardubice.

S-ro Jan Večeře, papervendisto, str. Rašínova 1372, de la 8a ĝis 18a.

S-ro Antonín Jandík, str. Husova, 87 (muelejo), tlf. 2646 de la 8a ĝis 18a.

S-ro Fr. Nálevka, poŝtdirekcio, ps. aŭ tlf. de la 8a ĝis 14a, tlf. nro 3281, substacio 239.

S-ino Růžena Veverková, Na Hrádku, 165 de la 8a ĝis 20a.

S-ino Lída Malá, str. Rašínova, 1399 de la 8a ĝis 20a, tlf. 2527.

S-ro Josef Hofmann, tlf. pro 2372—52.

Ostrava.

S-ro Stanislav Chaloupka, Slezská Ostrava, Jáma Terezie, tuttage.

S-ro Josef Mazánek, Dusíkárný n-ro 4, tlf. Ostrava 933-04.

ESPERANTISTA VIVO

La familio de niaj ŝatataj amikoj kaj kunlaborantoj Dolfá kaj Inke Bartošik pligrandiĝis je du filmetoj: Hanička kaj Miluška. Koran gratulon kaj multe da sano!

KORESPONDI KUN ĈS. SAMIDEANOJ DEZIRAS

20 bulgaraj knaboj, 14—18-jaraj, deziras komunan korespondadon kun ĉeĥaj amikoj pri diversaj temoj (naciaj kutimoj, moroj, vivo dum la okupacio ktp.). Skribu al: F-ino Z. Dimitrova, SLIVEN, C. Eleonora 20, Bulgario.

Dr. St. Berényi, Poŝtdirekcio, PÉCS, Hungario.

Lucien Van den Briele, soldato, Milita lernejo „6-e Brigade Infanterie“, Kazerne te VISÉ (Luik), Belgio. Ankaŭ interŝ. pm kaj il. pk.

Elpensu bone sonantan, facile prononceblan esperantan nomon (sen supersignoj) por oranĝeruga rozo kaj sendu vian proponon al centra oficejo de EACSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. Ni ne povas korespondi pri tiu ĉi afero, sed ni informos tie ĉi pri rezulto de ĉi tiu konkurso.

Malmultekosta efika rimedo por ĉesi fumadon (aŭ cigaredojn aŭ cigaron aŭ pipojn) estas mendebila ĉe s-ano Svačina Fran, delegito de IEL, en Lanžhot 663, Moravio.

Dum aŭgusto okazos
INFANA LIBERTEMPA KOLONIO
aranĝita de G. E. E. (esperantistaj edukistoj en Francio). Petu informojn ĉe I-ino J. Dedieu,
3, rue Arzac, Toulouse, Francio.

SOMERA ESPERANTO-LERNEJO EN DOKSY

aranĝos de la 19. VII.—2. VIII. 1947 (atentu la ŝanĝitan daton!) la jenajn kursojn: 1. **elementan** (por komencantoj); 2. **superan** (konversacian) kaj 3. **Esperantan seminarion** por la aktivaj esperantistoj (funkciuloj), instruistoj de Espo kaj tiuj, kiuj deziras regi Espon same kiel sian gepatran lingvon. En la seminario oni prelegos: pri la specialaĵoj de la Espa gramatiko, historio de la E-movado (enlanda kaj internacia), E-literaturo, pedagogia avantaĝo de la instrua Ĉe-metodo, oratora arto, E. en praktiko k. s.

Instruos kaj prelegos: PhDr. A. Pitlík, lektoro de Espo ĉe la Alta lernejo por specialaj sciencoj en Praha, K. Šolc kaj V. Špúr, ŝtate ekzamenitaj instruistoj de E., J. Hanuš kaj A. Slanina, diplomitoj de EACSR, k. a.

Ĝis nun estas fiksitaj la jenaj entreprenoj kaj amuzadoj por la vizitontoj de la Lernejo: Festkunveno okaze de la 60-jara datreveno de la estiĝo de E., Espa prezentado de la komedio „Nokto en Karlův Týn“ de Vrchlický, vespero de l’ „Arta kanto en ĉeĥa muziko“, letervespero internacia, somera karnavalo, aŭtomobilaj ekskursoj al Bezděz kaj Ještěd. La solena malfermo de la Lernejo kaj la karnavalo okazos en la salonego de la doksa kastelo. Oni atendas ĉe-eston de la eksterlandaj esperantistaj gastoj.

Kiu intencas pasigi agrablan someran liber-tempon kaj forpermeson en la amika esperantista medio, partoprenu la kursaron en Doksy, ĉirkaŭita per naturaj belaĵoj de la „Ĉeĥa maro“ Lago de Mácha! Ĉar la nombro de la ĉeestantoj estas limigita, petu tuj tiurilatajn informojn kaj aliĝilon de s-ano K. Šolc, Mladá Boleslav I, Železná 41.

La prepara komitato.

ESPERANTO V CIZINĚ

Francouzi a esperanto. Světoznámý americký Gallupův ústav pro výzkum veřejného mínění (Gallup Polls) zjišťoval nedávno ve Francii, jaké stanovisko má francouzská veřejnost k esperantu a zjistil - jak sděluje »Esperanto internacia« (X, 5, 69), - že stanovisko Francouzů k esperantu je příznivé: pro povinné vyučování esperantu na školách vyslovilo se 65%, proti 20%, nevyjádřilo se 15%. Jistě zajímavé, uvážíme-li, že každý velký národ snaží se vnutit světu jako jazyk mezinárodní jazyk svůj, aby tak dosáhl politické, kulturní a hospodářské převahy nad ostatními národy na světě.

Tázání odpovídali na tento dotaz: Považujete za žádoucí povinné vyučování mezinárodnímu jazyku, jako je esperanto, ve školách všech zemí? — Pro se vyslovilo podle místa 63% měšťanů (proti 21%) a 66% vesničanů (proti 20%); pro podle pohlaví 64% mužů (proti 20%), 65% žen (proti 20%); podle věku 80% mladých (proti 20%), 75% dospělých (proti 25%) a 73% starých (proti 27%); podle zámožnosti 77% nemajetných (proti 23%), 77% majetných (proti 23%) a 70% bohatých (proti 30%); podle politického přesvědčení 87% krajních levičáků (proti 13%), 78% levičáků (proti 22%), 68% středu (proti 32%) a 62% pravičáků (proti 38%). Jak vidno, pro esperanto se vyslovili převážně venkované, ženy, mladí, nebohatí a nejlevějšího smýšlení, což je přirozené: měšťáci, muži, staří, bohatí a pravičáci mají větší znalosti jazykové, případně větší příležitost ovládnouti cizí jazyky nežli ostatní nebo (poslední) zájem o dorozumívání vůbec nemají.

Mezi důvody hlasování pro (65%) byly především tyto: sblížení národů a tím odstranění válek; usnadnění cestování a přestěhování do ciziny; usnadnění mezinárodního obchodu; mnozí projevíli mínění, že se tak mělo státi už dávno a že se to má provésti už proto, poněvadž to může přinésti jen dobro a nikomu to nemůže uškoditi.

Námítky odpůrců (20%) byly hlavně: ukázal se dosud jen neúspěch; lépe se učiti cizím jazykům, francouzštině a angličtině (mluví jimi tři čtvrtiny světa); žáci jsou již přetíženi učivem; nesblízuje to národy, jako jazyk sám nepůsobí na sjednocení jednoho národa; je to utopie, škoda času.

JUBILEA LETERVESPERO

Unu el la plej malnovaj E-societoj estas la Unuiĝo „Zaandam Antaŭen“, kiu informas nin, ke ĝi baldaŭ festos la datrevenon de sia fondo antaŭ 35 jaroj. Zaandam estas urbo kun 40.000 enloĝantoj, proksime al Amsterdam, kun multa industrio, centro de tipe holanda regiono. La Unuiĝo petas ĉiulandajn samideanojn helpi ĝian feston kaj laboron per sendo de salutleteroj kaj esperantaĵoj. Ĉiu sendaĵo estas respondota. Adreso: Zaandam Antaŭen, s-ino A. Hazen, Beukenlaan 12, ZAANDAM, Nederlando.

Ti, kteří se nevyjádřili (15%), nebyli odpůrci, ale lidé k věci lhostejní a lidé věci neznalí.

I když význam zkoumání Gallupova ústavu nepřeceňujeme, můžeme jej s uspokojením přimouti jako pobídku k usilovnější práci propagační.

Řecké ministerstvo kultu a národního školství vydalo oběžník čís. Prot. 99 727 z 2. prosince 1946, v němž připomíná přednostům škol všech stupňů své dřívější výnosy o esperantu a vyzývá je, aby usnadnili všim způsobem pořádání kursů esperanta pro žactvo gymnasií a státních pedagogických akademií, které bude pořádati „Vyšší řecký esperantský ústav“ v Athénách. Doporučuje se, aby správce ústavů před zahájením kursu připomněli žactvu „velký význam, kterého dosáhl v současné civilisaci tento jazyk, a aby zároveň doporučili žactvu, aby kurs pravidelně navštěvovalo“. Zároveň se doporučuje správcům ústavů, aby četli orgán řeckých esperantistů „Řecký esperantista“.

SVAZ ESPERANTISTŮ ČSR
z v e n a

letní esperantskou školu

která se tento rok koná opětně
v Doksech u Máchova jezera
19. července — 2. srpna 1947.

Elementární kurs esperanta podle Csehovy metody,

jímž se naučí úplní začátečníci esperantské
konversaci za 14 dní.

Kurs pro pokročilé

(literatura, stylistika, konverzace).

Seminář pro studium esperanta,

jeho teorie, stylistiky, literatury a historie. Teorie umělých jazyků. Práce semináře je zaměřena jednak k přípravě učitelů esperanta, jednak k usnadnění podrobného studia interlingvistiky.

Ředitelem školy je PhDr. Aug. Pitlik, lektor esperanta na vysoké škole techn. v Praze. Dopoledne jsou zcela věnována kursům. Odpoledne a večery jsou vyplněny společenskými podniky, jež doplňují cíl kursů: Přednášky, besedy, diskuse, film, koupání, exkurse, táborový oheň, sport, podniky, letní karneval, hudeb. akademie. Bude provedena v esperantském překladu **Vrchlického veselohra „Noc na Karlštejně“**. Je slíbena účast prominentních cizích esperantistů. - Podrobné informace o ubytování a o ostatních podmínkách podává Karel Šolc v Mladé Boleslavi I, Železná 41.